

Bô Yin Râ

J. SCHNEIDERFRANKEN

LA VOJO DE
MIAJ DISCÎPLOJ

KOBER'SCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG
BASEL – LEIPZIG 1932

KOPIRAJTO ĈE
KOBERS' SCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG
BAZELO 1932

“Ke ni instruas tiajn aferojn,
Oni pro tio ne punu nin.
Kiel ĉio klarigeblas,
Demandu vian plejinternon.”
Goethe

Kiun mi rigardas kiel mian disĉiplon

Ke mi certe ne povas *agnoski* kiel mian disĉiplon ĉiun, kiu *nomas* sin tia, ne fariĝu malhelpaĵo al tiuj, kiuj vere *montriĝis* kiel miaj disĉiploj en siaj agado kaj konduto, aŭ estas pretaj *pruviĝi* kiel veraj spiritaj disĉiploj.

Ĉiu homo estas lia aŭ ŝia propra *juĝanto!*

Juĝanto pri si mem, kontraŭ kies juĝo eterne ne ekzistas „apelacio“.

Kaj lia juĝo estas ne la rezulto de juĝado en *pensado*, sed konfirmo per *agado*.

Ĉiu determinas sin mem per sia propra konduto, tiel ke li ne kapablas esti io alia ol ĝuste tio, por kio tiu konduto montras lin kapabla.

Ekstera gesto, aŭ memdonita nomo, povas trompi la propran juĝkapablon aŭ la kunhomojn, sed tute ne povas ŝanĝi la pozicion en la substanco spirita vivo, pozicion, kiu estas determinita per la propra *agado*.

Kiu vere estas mia disĉiplo, tiu tion *scias*, ĉar li *scias*, ke li *agadas* tiel, kiel miaj instruoj tion *postulas* de *ĉiuj*.

Li ne bezonas mian eksplicitan agnoskon, ĉar lia *agado* diras al li kun plena certeco, ĉu mi povas alkalkuli lin al la nombro de la miaj, aŭ ne.

Mi ne povas fari iun homon en la mondo mia disĉiplo vere ligita kun mi en la praluma spirito, kiu ne *el si* mem *estas* tia rezulte de siaj pensado, sentado, volado, parolado kaj agado.

Ĉu iu el miaj disĉiploj konas min persone, estas la plej malgrava afero por li.

La pasema korpa homo, riĉa je mankoj kaj spertanta sin mem en diversaj suferoj, kiel kiu mi vivas sur la tero, estas por mi en tiu ĉi sfero de videbleco nenio alia ol tio, kio la videbla montrilo estas por la kaŝita mekanismo de la horloĝo.

Tiu korpa homo havas nenian rilaton al la instruo prezentita de mi, escepte kiel peranto.

Ankaŭ estas tute sensignife, kaj ne proksimigas al mi homon kiel disĉiplon, ke persono diras pri si, en maniero embarase bigoteca, ke li „staras firme en la

instruo“, ĉar li „*enmemorigis*“ preskaŭ ĉion entenatan en miaj libroj.

Se tio enprenita el miaj vortoj estas nur *cerba posedaĵo*, ĝi restos tia posedaĵo nur tiom longe, dum la cerbo povas „memorteni“ ĝin.

Neniom da ĝi eniros en la *daŭron*.

Nur tio, kio estis transformata en *agadon* kaj *vivoformon*, konserviĝas *daŭre*: – tiam, kiam neniu ĉelo de la cerbo plu ekzistas en la sama formo, kiu iam estis necesa por okupiĝi pri tio transprenita el miaj libroj. –

Esti mia disĉiplo ne estas sekvo de speco de *distingo*, kiun mi eble povas „doni“.

Mia disĉiplo estas ĉiu homo, kiu *profundiĝas* en la instruojn prezentitajn de mi, kaj tiam devoligas sin *antaŭ si mem*: ekde nun aranĝi sian propran vivon, kiom eble al li, laŭ la konsekvencoj, kiuj rezultas el miaj instruoj al persono logike konkludanta.

Tio koncernas min nur tiurilate, ke mi fariĝis la lingva formanto de sciigoj bazitaj sur propra sperto, kaj la interpretanto de praantikvaj instruoj, kies verco mi povis elprovi.

Certe, tie ĉi temas pri sferoj de spertado, kiuj estas alireblaj al neniuj el miaj kunhomoj sur la okcidenta flanko de la terglobo, – sed ankaŭ sur la *alia* flanko nur al treege malmultaj, el kiuj neniuj havas la *taskon* doni sciigojn al la publiko.

Mi apenaŭ povas malpermesi al disĉiplo mia nomi min sia „majstro“, nun ke estas konate, ke en la landoj de sunleviĝo oni nomas homojn de mia speco, kaj fakte ĉiun spiritan instruanton, per vortoj laŭsignife plej proksimaj al „majstro“, – mi tie ĉi eĉ povus montri „rajtigitcon“ spirite bazitan, – sed mi vidas en tiuj esprimoj sencon kaj valoron *nur tiam*, se la persono ilin uzanta kapablas plenigi ilin per sia scio pri la *realo* indikita per ili.

Sed ĉar nur plej malmultaj kapablas fari tion, mi ree kaj ree petas, ke oni *evitu* uzi la vorton „majstro“, precipe ĉar neniuokaze oni eniras en rilaton de disĉipleco kun mi, se oni uzas tiun vorton aŭ alparolas min per ĝi.

Estas ne malgranda malsaĝo, se oni pensas, ke *pure spirita* rilato, kiu etendiĝas fore transen de ĉia tera ekzistado, dependas de iu ekstera monstro de agnosko.

Krome, ne tute ĝusta opinio pri mia spirita instruado malkaŝas sin per tio, ke oni, kun la afabla intenco fari al mi ĝojon, pensas devi entuziasme sendi al mi ĉiun gazetan recenzon, kies aŭtoro havas bonon por diri pri miaj libroj, dum aliaflanke oni sendas al mi vere kondolencajn leterojn, se iu nekonata provincano insiste asertas – en iom mizera gazeto, kies ŝatantoj certe *neniam povas* esti konsiderataj kiel disĉiploj de

miaj instruoj – sian rajton pri knaba miskonduto, rajton, kiun li bezonas por ricevi la estimon de siaj legantoj.

Ĝenerale mi rigardas la librorecenzojn en bone gvidataj revuoj kaj gazetoj kun ĉiu dezirinda respekto, kiun oni nepre ŝuldas al la opiniesprimo de kunhomo, kiu mem havas iom por diri.

Pleje oni jam ekkonas je lia unua frazo, „laŭ kiu spirito“ la recenzinto estas, kaj kian gradon de atento lia opiniesprimo meritas, eĉ se oni ankoraŭ ne konas lian aŭtoran signon aŭ lian nomon.

Se mi kreus pure *poeziajn* verkojn aŭ skribus sciencajn librojn, recenzoj pri miaj libroj estus tre gravaj al mi interalie pro tio, ke mi sentus min devigata esplori la spegulan bildon de mia laboro en la juĝo de kunhomoj havantaj maturan juĝkapablon, por vidi ĉu kaj kiel tiu bildo estas utiligebla en mia plua verkado.

Tamen, mi staras antaŭ la publiko ne kiel poeto kaj ne kiel reprezentanto de scienco aŭ de religia komunumo, sed formas miajn instruajn tekstojn nur el rezultoj de miaj individuaj spertoj, kaj el perceptokapablo, kiu doniĝis al mi kaj kiun hodiaŭ neniu alia homo en Eŭropo posedas. Tial recenzo pri tio, kion mi devas skribi, ne estas facila afero eĉ al la plej bonvola recenzanto, kaj lia juĝo ne povas multe helpi al mi, kvankam lia recenzo pri la libroj povas kontribui

multon al tio, ke ili venas en la manojn de tiuj, kiuj ilin bezonas kaj ankoraŭ serĉas.

Sed mi pensas, ke ĝuste la multaj seriozaj recenzintoj, ankaŭ al kiuj miaj libroj *ŝuldas* sian disvastigon, pli facile ol aliaj komprenos, ke mia instrua verkaro povas esti *juĝata nur tiam*, kiam la juĝanto jam komencis *agadi laŭ miaj instrukcioj*.

Ne valoras la penon paroli pri *tute absurda* klasifikado de miaj libroj kaj mia persono, kvankam eksterpublike renkontas min ankoraŭ sufiĉe da strangaĵoj – jen en plej drola maskovesto, jen kun gesto aroganta – en kelkaj el la multaj *leteroj*, kiujn mi neniam povas respondi.

Ĉi tie estas la ĝusta loko por eksplicite diri, ke mi ne povus preni sur min, eĉ rilate al miaj veraj kaj elpruvitaj disĉiploj, la devon interŝanĝi leterojn. Tial la nerespondado de leteroj adresitaj al mi *neniam* devas esti interpretata en la senco, ke mi volas – laŭ la proverbo: „Ne donita respondo ankaŭ estas respondo“ – esprimi mian juĝon pri la ricevita letero aŭ eĉ pri ĝia sendinto.

Letero povas pasie interesi aŭ arde kunsentigi min, tiel ke mi povas havi multon por diri rilate ĝian enhavon, kaj tamen mi devas malpermesi al mi respondon, ĉar la amplekso de mia korespondado jam de longe ne plu estas plivastigebla. Ĝi eĉ ne povas esti

daŭrigata en sia nuna amplekso, se mi ne volas malutili al miaj esencaj vivotaskoj per la displitado de fortoj, kiuj postulas plej intensan koncentriĝon. –

Tion scias kaj atentis miaj plej proksimaj disĉiploj, sed ankaŭ malpli proksimaj montras la saman komprenemon, kio vidiĝas el la multaj leteroj, kiuj volas esti rigardataj nur kiel korvarma saluto, tiel ke la sendintoj pleje eĉ ne mencias sian adreson.

Al ili mi tie ĉi diras mian apartan dankon!

Sed plej klare mi devas kontraŭi opinion pri la devoj de disĉiplo, kiu bedaŭrinde troviĝas tie kaj tie ĉi, eĉ ĉe disĉiploj cetere admirindaj kaj foren progresintaj!

Tiu ĉi aludo mia celas la penadon *varbi prozelitojn*: – la penadon disvolvi specon de „misiista agado“ por miaj instruoj kaj akiri distingon kiel „apostolo“ de tiuj instruoj.

Nenio povas esti pli malagraba al mi, kaj nenio estas pli granda obstaklo al la kviete aprezanta, sobra akceptado de tio, kion mi havas por diri, – nenio ĝis nun tiom forte malhelpis mian agadon, – ol tiu erara fervoro de fidelaj disĉiploj.

Mi vere komprenas la bonan *intencon*, kaj certe ankaŭ konas ĉiujn konsiderojn, kiuj delogas al tiu nelaŭdinda, troa fervoro, sed mi bedaŭrinde ne povas kaŝi al tiu senpacienca volo al predikado la amaran

veron: – ke ĝi *fortimigas* multe pli da homoj for de senantaŭjuĝa okupiĝo pri la enhavo de miaj libroj, ol ĝi iam kapablas alkonduki al tiu okupiĝo. –

Krome, en tiu senpacienceco malkaŝiĝas malgranda, kvankam pardonebla trotaksado de la propra *forto konvinki*, kaj samtempe granda *subtaksado* de la praspiritaj potencoj, sole de kiuj dependas la plenumado de mia vivotasko.

La sperto klare montras al mi, ke inter ĉiuj homoj, kiujn mi hodiaŭ povas agnoski kiel miajn verajn disĉiplojn, ekzistas nur ekstreme malgranda aro da tiuj, kiuj unue aŭdis pri miaj libroj per „misiiste aganta“ disĉiplo. Al ĉiuj aliaj *la libroj mem* en iu ajn maniero „*venis*“, kelkfoje sur plej strangaj vojoj, kaj ankaŭ kiam temis pri homoj de tre fortika naturo, havintaj nenian intencon enpreni ion spiritan.

Kelkaj el miaj disĉiploj evidente ne atentis la diferencon, kiu ekzistas inter ilia bonintenca misiista laboro kaj la *komerce postulita varbado de la eldonejo*. –

Sed tie ĉi temas pri *esenca* diferenco!

Dum en ĉiu varbado de individuaj personoj gravas la arbitra *elektado fare de la varbanto*, la eldonisto prezentas sian varbadon antaŭ la ĝenerala publiko, lasante *al la spirita gvidanto* de ĉiu individuo la

decidon, al kiu homo li volas jam alkonduki la librojn, kaj al kiu ne.

Ĉiu eldoneja varbado baziĝas sur la konvinko, ke ekzistas sennombraj homoj, kiuj nepre bezonas miajn librojn, sed ankoraŭ ne scias pri ili. La eldonejo direktas sian varbadon al *ĉiu* leganto de siaj varbiloj, kaj sin gardas, ke ĝi ne faru ian ajn elekton. La *elektado* de tiuj, al kiuj miaj libroj venas rezulte de eldoneja varbado, restas la afero de *spirite* direktita provado de animoj, kiu neniam eraras.

Kontraste kun tio, eĉ la plej bonintenca *privata individua varbo* estas – aparte de raraj specialaj okazoj – tre kruda enmiksiĝo en la animan rajtosferon de la kunhomo.

Tia enmiksiĝo, nedezirata kaj pleje okazanta en maloportuna tempo, povas havi la rezulton, ke la homo tro frue traktata, – al kiu miaj libroj eble ankoraŭ tute ne estas bonvenaj, kvankam mia fervora disĉiplo havis alian opinion pri tio, – ekhavas veran antipation kontraŭ tio tiom forte rekomendita al li, precipe ĉar ekzistas multaj homoj, kiuj rigardas nur *tion* kiel akceptindan, kion ili *mem* trovis por si.

Sed eble la nun fortimigita persono estus *mem* trovinta post kelkaj tagoj aŭ semajnoj miajn librojn, kiujn li nun rezulte de la troa fervoro de mia disĉiplo intence tenas malproksime de si, – ĝis li, eble post

jaroj, fine trovas la vojon al ili en la maniero *adekvata* al li.

Mi bedaŭrinde povas apogi min sur *tre multaj* okazoj, en kiuj tro fervoraj disĉiploj estis provintaj gajni aliajn homojn por miaj skriboj, kaj per tio rezultigis *plej fortan reziston* kontraŭ ili, ĝis fine tiuj tiel malhelpitaj *tamen* trovis la vojon al mi, post kio ili raportis al mi pri sia sperto.

Kiu do volas agi ĝuste en tiuj ĉi aferoj, tiu lasu al la spiritaj potencoj, sub kies ŝirmo miaj libroj estas, la decidon pri tio, al kiu ili estu alkondukataj.

Tio tute ne signifas, ke oni devas eviti *eĉ nur paroli* pri la libroj! Mi volas, ke oni evitu nenion alian ol la *misiistan* „prilaboradon“ kaj „persvadon“ de aliuloj!

Sed ĉar pleje temas pri *tre elprovitaj* disĉiploj, kiuj sentas sin *instigataj* ankaŭ pledi antaŭ aliuloj por tio, kio alportis al ili mem lumon kaj iluminiĝon, mi pensas, ke tiu ĉi atentigo estas aparte grava.

Samtempe mi devas jam nun averti ĉiun disĉiplon mian, ke li *ne postulu tro multe* de si mem aŭ de kundisĉiploj konataj al li.

Estante laborema vojogardanto, mi liberigis la vojon, sur kiu la disĉiplo atingas la substancan spiriton kaj tiel la sekuran konsciiĝon pri sia propra aparteno al la spirito, de *tre multaj* malhelpaĵoj, kies

venkado antaŭe postulis preskaŭ superhomajn klopodojn.

Sed mi ne kapablas ankaŭ forigi el la vojo ĉiun *ascendaĵon*, kiu estas venkebla nur kun *persisteco*, ĉar ekde praa tempo la vojo etendiĝas sur firma roko.

De neniuj el miaj disĉiploj mi povas depreni la penon de *ascendado*, – neniun mi povas porti sur miaj ŝultroj al la montosupro.

Sed ĉiu kruta ascendaĵo estos venkata plej baldaŭ, se la migranto ne hastas kaj urĝiĝas, sed kapablas uzi siajn fortojn ĉiam kun saĝa modereco tiumaniere, ke li neniam povas fariĝi viktimo de trolaciĝo. –

Trankvila *fido pri la estonteco* kaj firma *fido pri la propra forto* proksimigos la strebanton al lia alta celo multe pli baldaŭ ol la trostreĉado de l' volo, al kiu senpacienulo estas tiom facile forlogata.

Necesa distingo

Kion la leganto komprenu sub „*spirito*“, tio certe estas klare ekkonebla en ĉiuj miaj libroj.

Sed ĉar en la ĉiutaga lingvouzo, kaj eĉ en la terminologio de erudiciuloj, tiu vorto estas uzata ankaŭ por priskribi la funkciojn de la homa *cerbo* kaj iliajn rezultojn, mi ree kaj ree spertas, ke iu aŭ alia el miaj disĉiploj laŭkutime *misinterpretas* la vorton „*spirito*“, kiam li renkontas ĝin en miaj libroj.

Tio certe ne estas miriga, ĉar en la ĉiutaga vivo oni parolas pri „*spirita*“ laboro, „*spirita*“ laciĝo, „*sprita*“ maniero de parolado, „*spritaj*“ rimarkoj, „*spirita*“ freŝeco, kaj ankaŭ pri vualigi de l’ „*spirito*“. La tiel celitan „*spiriton*“ jen oni levas sur la plej altan tronon, jen oni deklaras al ĝi *militon*, favore al la *animo*.

Sed tio, kion oni tie ĉi nomas „*spirito*“, estas *cerbolaboro*, – estas manifestaĵo de *cerbofunkcio*, kiu estas denaska aŭ perfektigita per konstanta ekzercado, – atesto pri aparte *rapida* laboro de l’ cerbo, aŭ pri ĝia longe daŭra *energio*. Aliaflanke, tio, kion oni nomas „*spiritomalsanoj*“, estas *cerbomalsanoj*, ĉu rezultintaj

el *ekkoneblaj fizikaj* kaŭzoj, ĉu kaŭzitaj de *okultaj influoj*.

Estas nur signo de la propra malproksimeco disde la spirito, ke la tera homo, „falinta“ el la konscia esto de la substanca spirito, sentas la manifestiĝojn de sia cerbo kiel ion „spiritan“, tiel ke oni parolas pri „vigla spirito“, kiam oni celas priskribi vigan *cerbon*.

Nur tie, kie la vorto „spirito“ signifas normale nevideblan, senkorpan individuan estaĵon, t.e. „aperaĵon el la transa mondo“, ankoraŭ malklare eklumas la lasta radio, preskaŭ plene ensorbita de mallumo, de praa sperto pri la *substanca* „spirito“, eĉ se la imagoj, kiun la tera homo kreis por fari ion nevideblan imagebla al si, kelkfoje montras tre fantastan, groteskan, banalan formon.

En la sferoj de eŭropigitaj religioj ja estas tre multe *parolate* pri la spirito, sed kiam oni atentigas la vere sentitan tonon de la vortoj, oni tuj rimarkas, ke eĉ tiam nur pli subtila speco de la *cerbofunkcio* estas nomata „spirito“, nome kiam estas parolate pri la spirito de la *eterneco*, pri la spirito de *Dio*, pri la „*sankta*“ spirito.

Certe, Dio estas spirito, kaj „liaj adorantoj“ devas adori lin „laŭ spirito“, do en „vero“, sed sub tiu spirito, kiu estas *Dio*, oni komprenas nur cerban konsciecon analogan al la homa cerbosperto kaj

gigante altigitan, kaj la *adoradon* laŭ spirito oni interpretas ne tre alie ol kiel adoradon en *pensado*.

Pri la *substanca eterna spirito*, kiel kies tralumanta radiado Dio sole povas fariĝi vive spertebla *en ni*, oni scias nenion.

Ne estas mirige, se leviĝas voĉoj vokantaj al batalo kontraŭ la prioritato de la „spirito“ de la *cerboj*, ŝanĝbrilanta en tiom multe da suspektindaj koloroj!

Ne mirige, se oni volas defendi kontraŭ ĝi la rajtojn de la *animo*!

La impulso al tiu batalo rezultas el la sentata certeco, ke la tera „spirito“ de la cerboj tute ne povas esti tio plej alta spertebla en nia interno.

Per „klarsentantaj“ internaj sensoj oni palpe proksimigas sin al la *animo*, en kies eksterigoj oni sentas forton, kiu estas senfine supera al la cerba scio pri si mem.

Oni necese *devas* malakcepti la parolon de Paŭlo, ke la spirito esploras ĉion, eĉ „la profundaĵojn de Dio“, – tiom longe, kiel ĉe tiu diraĵo oni pensas pri „spirito“, kiu estas nenio alia ol la rezulto de la funkciado de cerboĉeloj.

Sed ke tie ĉi estas la parolo pri la *substanca eterna spirito*, kiu *kreas* la cerbon el si mem kaj estas *neniel dependa de la cerbo*, tio bedaŭrinde jam antaŭ longe fariĝis sekreto ...

La tera homo turnis sin al pli kaj pli diferencigitaj pensotaskoj, ĉiam plene sub la influo de la eraro, ke lia cerbokondiĉita pensado estas „*spirito*“ el la spirito de la eterneco, – kaj nur en raraj homoj povis konserviĝi milda suspekto, ke ekkono devas esti ebla, kiu neniam povas fariĝi atingebla per cerba laboro, – ekkono el la reala *spertado* de la spirito, ne el rezona konkludado, induktado kaj deduktado.

Sed *kiel* oni povas atingi tiun ekkonon, apenaŭ iu homo povis diri, kvankam ne mankis atestoj, ke tio ja estas ebla.

Sed en ĉiuj tempoj tio fariĝis ebla nur al tiuj, kiuj sukcesis veni „en la spiriton“: „en“ la substancan, el si mem vivantan, nedetrueblan, neŝanĝeblan spiriton de la eterneco!

Tiu ĉi „spirito“ estas tiom malmulte kaptebla en la cerba *pensado*, kiom per teraj animalaj sensoj.

Ni devas esti „*en*“ ĝi, se ni volas ekkoni, sondi, esplori en ĝi, kaj ni *povas* veni en ĝin, ĉar ni estas – ankaŭ fizike – *travivata* de ĝi: – ĉar ĝi „vivas“ en *ni*, eĉ se ni ankoraŭ *ne* kapablas vivi en ĝi...

Sed neniam ni povas veni „en la spiriton“ helpe de iu ajn speco de *cerba aktiveco*!

Temas ja pri *okazado*, kaj ne pri elpensado aŭ imagado!

Tiu ĉi okazado povas ja esti „registrata“ de la cerbo kaj tiam *enigata* en la pensadon kiel certigita fakto, sed absolute ne *ekigata* fare de la cerbo.

Kiel oni atingas la spertadon de tiu okazado, mi montras en miaj libroj.

Nur por *montri* tion tie ĉi necesan mi *skribis* ilin, vere: per mia *kora sango!*

Sed ĉar ekzistas *multaj* ebloj ekigi tiun okazaĵon, mi montras ankaŭ la *apartaĵojn* de la diversaj, diferencaj *manieroj* iri la vojon kondukantan al la celo.

Ĉiu vorto, kiun mi skribis, servas por montri la vojon tiel, ke ĉiu unuopa homo, kiu volas iri ĝin, povas kun malmulte da peno trovi la manieron iri ĝin, kiu konformas al liaj kapabloj. Mi ne nur markas la vojon, sed ankaŭ donas perspektivojn, kiuj prezentigas de certaj vojostacioj aŭ de la fina celo de la vojo konata al nur tiom malmultaj homoj.

Estas eraro ne tute sendanĝera, se kelkaj legantoj de miaj skriboj pensas, ke iliaj kapabloj estas *nelimigitaj*, tiel ke unuopulo laŭplaĉe povas iri la vojon laŭ tiu *kaj* alia maniero de mi montrita, aŭ eĉ laŭ ĉiuj manieroj *samtempe*.

Ĉiu homo kunportas kun si *aliajn* ecojn sur tiun ĉi teron, kaj tiam ĉiu estas dejunece influata de homoj

kaj cirkonstancoj, de spertoj, kaj de propraj kaj fremdaj imagoj; el ĉio ĉi rezultas, laŭ kiu *maniero* li devas iri la vojon, se li volas veni „en la spiriton“

Mi pensas, ke mi sufiĉe klare montras en miaj libroj, kion *unu* maniero kondiĉas, kaj kion *alia*.

Homoj de mia speco, kiuj, kiel mi, konas la diversajn manierojn iri la vojon, sed pasigis sian junaĝon sub la senindulga disciplino, ŝajnanta al ni „kruela“, de orientaj instruantoj de saĝo, sentas la enhavon de miaj skriboj „tro facile komprenebla“, ĉar ili opinias, ke la vojo al la spirito ne povas sufiĉe barata per obstakloj, ĉar estas inda je la celo nur tiu, kiu ne lasas sin fortimigi eĉ de la plej terura obstaklo.

Same pensis la veraj inicitoj de *antikvaj* „misteroj“ en Ĉinio, Hindio, Babilonio, Persio, Egiptio, Grekio kaj Romio, se temis ankoraŭ pri vera scio rilate la samajn eblojn de okazado, pri kiuj estas parolate en miaj libroj.

Tamen oni ne devas imputi al mi, ke mi esprimis min kun tiom „klara komprenebleco“ en miaj tekstoj, sen havi por tio validajn motivojn bazitajn sur respondeco.

Tie ĉi, la decido estis nur *en mia mano*, sed mi samtempe sciis, kial ĝi restis lasita ĝuste al mi.

Mi estas nek homo de la antikveco, nek aziano, kvankam mi, tempe kaj regione, trovas *ambaŭ* vivosferojn *inkluditaj substancaspirite* en la miaj, –

sed estante eŭropano de la dudeka jarcento laŭ kristana tempokalkulo, mi bedaŭrinde konas la *malpaciencon* kiel la karakterizan trajton de la homaro de mia tempo, kaj tial ankaŭ scias, ke nur tre malmultaj el la samtempuloj povus esperi ricevi utilon el mia verkaro, se mi volus paroli en miaj libroj lingvaĵon sekreteman, kaj laŭeble barikadi tion, kion mi deziras fari alirebla por ĉiuj.

Sed en ĉiuj miaj skriboj temas pri aferoj, kiuj certe ne donas sin facile al la *lingvo*.

Tio, kion mi havas por diri, ne volonte lasas sin enkapti per *vortoj*.

Krome, mi ne havas antaŭ mi legantaron sufiĉe *preparitan*, ĉar, malgraŭ la vulgarigo de ĉia scio pri kulturoj estintaj aŭ fremdaj al okcidento, oni ne konas, eĉ inter la koncernaj erudiciuloj, la karakterizaĵojn, per kiuj oni en tiuj kampoj de scio povus distingi superstiĉon disde vera *ekkono de la realo*.

Pri tiuj karakterizaĵoj povas scii nur homoj, kiuj jam *estas* „en la spirito“ kaj sekve kapablas ekkoni „el la spirito“.

Sed por tiaj homoj mi ne skribas, kaj ili ne bezonas miajn sciigojn.

Sed kiu volas esti mia disĉiplo, ĉar li deziras trovi la vojon „en la spiriton“ en la maniero konforma al sia naturo, tiu agos ĝuste, se li ne arbitre *intermiksas* la

diversajn manierojn iri tiun vojon, sed elektas al si tiun, kiu aparte tuŝas lin, kaj poste li povas trankvile lasi neatentitaj la aliajn eblojn montritajn de mi.

Mi ne sciigas pri la substanca spirito por starigi malmolan instruon, kiun kapablus sekvi nur la plej harditaj homoj.

Mi montras el la spirito, kiu estas la *amo*, la manieron de la amo kaj eterne neelĉerpebla kompatemo: – la vojon de la kompato disfluiganta sin mem.

Mi ne nur montras la vojon, sed ankaŭ indikas tiujn el ties markojn, kiujn la serĉanto devas koni.

Ĉiu povas teni en sia memoro la vojomarkon, kiu estas al li *plej facile* kaptebla, kaj li tiam ne lasu sin konfuzi per la markoj, al kiuj *aliaj* serĉantoj kapablas sekvi pli bone.

Tio, kion mi en miaj skriboj nomas „spirito“, ne estas komparebla kun io surtere konata.

Ĝi estas la *laŭesence plej adekvata* manifestiĝa formo de la *pra-esto*, el kiu originas ĉio ekzistanta, – de kiu ĉio ekzistanta ricevas „*vivon*“, tiom longe, dum ĝi ekzistas en sia propra formo.

Se mi diras: ĝi estas libera elektra energio de neimageble alta tensio, kiu *trapenstras* ĉiun korpon enmetitan en ĝian kampon de forto, kaj *manifestiĝas en ĝi* depende de ties taŭgeco, – tio certe ne estas komparo, sed ja utila bildo, kiu povas malhelpi la estiĝon de eraroj.

Ni portas en ni la kapablon sperti tiun pra-eston, sed sen nia propra konscia kunagado eĉ „graco“ ne povas disvolvi tiun kapablon tiumaniere, ke ĝi povas malkaŝi al ni la por ĝi alireblan mondon de la esenca substanca spirito.

Tiu ĉi mondo de la praeterna spirito, kiu siaflanke ampleksas sennombrajn individuajn mondojn, ne estas senorda kaoso, sed io konstante moviĝanta: – kosmo de plej klaraj formoj konstante ŝanĝiĝantaj, tamen identaj kun si mem.

Kiu volas lerni sperti la mondon de la spirito, tiu antaŭe devas forigi en si mem la malhelpojn, kiuj estiĝis el la ideo, kvazaŭ tio spirita neperceptebla al la tera okulo estus tute ne sensebla aliamaniere, sed estus aereca, en si neordigita blovado kaj ondado sen generado de difinitaj formoj.

Li devos havigi al si klarecon pri tio, ke lia propra fina *vivokaŭzo* estas la spirito, – ke la organismo de la *spirita* „korpo“ povas ekaktivi jam dum la surtera korpa vivo, kaj ke tiam disvolviĝas pure *spiritaj* „sensoj“ anstataŭ la korpaj, fizikaj sensoj.

Sed la serĉanto ankaŭ devos diri al si, ke spertado en la spirito povas okazi nur laŭ *spirita* perceptomaniero, tute same kiel la fizika mondo ĉirkaŭanta nin tie ĉi surtere estas spertebla por ni nur laŭ la *fiziksensa* perceptomaniero.

Kaj kiel en la fizika mondo la spertado estas kondiĉita de la *fizikaj* sensoj, tiel ankaŭ en la spirito *nur tio* povas esti spertata, kion la stato de disvolviĝo de la *spiritaj* sensoj de l' individuo ebligas sperti.

Same kiel en nia fizika tera mondo la teraj sensoj havas tute diferencajn eblojn de disvolviĝo, rezulte de kio la mondspertado de ĉiu homo estas *alia*, depende de tio, ĉu tiu aŭ alia senso alprenas la gvidan pozicion, tiel same la spirita spertado dependas de la kapablo de disvolviĝo de la *spiritaj* sensoj, kapablo kiu estas alia en ĉiu homa spirito.

Se la vico de analogeoj tie ĉi montritaj estu komplete, mi ankoraŭ devas atentigi la disĉiplon pri tre grava egaleco, kiu certe *kondiĉas* ĉion antaŭe diritan, sed tute ne okupas la lastan rangon, kiam oni parolas pri spirita spertado.

Mi tie ĉi celas la fakton, ke ni povas sperti tion spiritan, same kiel tion fizikan, ekkonante kun *malvarma, sopra objektiveco*, kiel ankaŭ kun la tuta varmo de *anima* harmonia akordo.

En la *fiziksensa*, kiel en la *spiritsensa* spertado ĉiam temas nur pri la spertado de diferencaj *aspektoj* de la sama *praforto*, kiun en unu el miaj libroj mi tial nomis „*tio sola reala*“.

En „*tion solan realan*“ eterne ne povas penetri alia ol ĝia *propra* „konscio“, tiel ke, eĉ por la plej altaj, surtere neimageblaj ŝtupoj de eterna spirita homeco, ĝi kvazaŭ ne ekzistus, se ĝia ekzisto ne estigus la influenco-fenomenon de la *animo-elementoj*, kiuj kaj en la fiziksensa kaj en la spiritsensa vivo penas efektiviĝi sin en ni, se ni mem ne malebligas tiun efektivigadon.

Tial estas treege grave, kiujn animo-elementojn ni sukcese povas *unuigi* en nia plej interna volado, – *identigi kun* tiu ĉi volado. –

Ne nur por nia surtera, sed en multe pli alta grado ankaŭ por nia *spirita, eterna* spertado!

Tial por tiuj volantaj veni „en la spiriton“ estas plej alta kaj plej severa devo, gardi siajn animo-elementojn kontraŭ „damaĝo“, por ke la plej alta strebado ne finiĝu per la „*morto*“ de la animo, ĉar tiu malvarme objektiva ekkonado, al kiu mankas la ardo de la animo, estas *memkondamno*, kiu ne povas finiĝi, ĝis la individua konscio en la paso de eonoj konsumiĝis en ĝi ...

Kvankam la impete fervoraj batalantoj por la animo, avertante, ke la „spirito“ de la *cerboj* povus mortigi la animon, ne konas la *eternan substancan* spiriton, ili ene de sia sfero de spertado tute ne eraras.–

La spertado de la eterna, substanca spirito estas tute nedependa de la „spirito“ de la cerboj: – de la pensado kaj la povo de konkludado.

Nur por la *spegulado* kaj la *komunikado* de tio spirite spertita ni bezonas tie ĉi, en la fiziksensa stato, la laboron de la cerbo.

Aliaflanke, la *animo-elementoj*, kiuj – se oni permesas al mi diri tion sen la risiko favori eraran komprenon – en nia spirite formita „mi“ *anstataŭas* la fizikan cerbon, estas la eterna pravigo de tiu spertado.

Post ĉiuj ĉi klarigoj, kiuj servu por *faciligi* al miaj disĉiploj formi sian vivon laŭ la instrukcioj de miaj libroj, mi tamen devas ree atentigi pri tio, ke mi mem plej altgrade konscias, ke ĉiu homa lingvaĵo estas nur tre neadekvata instrumento por prezenti spiritan realon.

Mi do devas peti, ke mia disĉiplo ne faru al si la trivialan plezuron, ekzerci je miaj vortoj sian nedubinde ekzistantan sagacecon per tio, ke li penas eltrovi, ĉu oni eble povus doni al ili *alian* sencon ol tion celitan de mi, kiun mi pensas esti difininta kun sufiĉa klareco.

Ne estas eble, paroli aliamaniere pri io travivita, kion oni devas esti *spertinta* por koni ĝin, ol per parafrazoj, bildoj kaj paraboloj.

Mi devas premiĉi ĉe miaj disĉiploj la sinceran *volon* kompreni!

Aliaflanke mi ne povas sufiĉe severe averti, ke oni ne praktiku rigidan *vortokulton* rilate miajn librojn.

Mia disĉiplo lernu el miaj vortoj senti la celitan *sencon* kaj *agu* laŭ tiu senco.

Mi vere ne volas estigi novan ortodoksismon!

Ĉiu trankvile traduku miajn vortojn en lingvaĵon, kiu estas pli proksima al lia persona sentado, se tio faciligas al li la komprenon.

Sed ju pli la serĉanto antaŭeniras sur sia vojo, des malpli grava estos al li ĉiu parabolo aŭ la ekzistanta neadekvateco de la vortoj formitaj por priskribi terajn, eksterajn aferojn, ĉar tio, kion li trovis konfirmita per propra sperto, servos al li kiel taŭga, sekura ŝlosilo por ĉio venonta.

Nenecesa memturmentado

La plej multaj homoj de la okcidenta kulturrondo – ne gravas, al kiu religia komunumo ili apartenas – *scias nenion* pri la eblo disvolvi ĝis spertokapablo, jam tie ĉi dum la surtera vivo, la substancan spiritan organismon, kiu post la finiĝo de la terkorpa ekzisto estos nia sola portanto de konscio.

Aliaj aŭdis pri tiu eblo de disvolvado, – kvankam de plej dubinda flanko, – sed ne kapablas kredi je tio.

Ankoraŭ aliaj suspektas, ke estas *eble*, ekkoni per propra spertado la mondon *ne* sperteban per terkorpaj organoj: la mondon de la eterna spirito, kaj vane serĉas „metodon“ por atingi tiun ekkonon.

Tre disvastiĝinta inter tiuj ĉi serĉantoj estas la kredo, ke la celo de ilia serĉado estas „transformiĝo ĝis spiriteco“ – kaj ĉar ili konas je si nenion alian ol sian terkorpe kondiĉitan specon de ekzistado, ili pensas, ke ili proksimigas sin al sia celo plej facile per laŭsupoza spirita transformado de la tera korpo.

Tiu ĉi povra tera korpo ja estas *en vivo* nur per la spirito, sed ĝi neniam povas *fariĝi* spirito.

Ĉar oni nun vidas, ke ĝi defendas sin en sia maniero kontraŭ tiu postulo neadekvata al ĝi, oni penas „*subigi*“ ĝin, kaj opinias ĝin venkita, kiam oni pensas fine esti „*mortiginta*“ la plej bonajn fortojn de l' korpo vivigita de la spirito.

La homoj aparte perfortemaj en tiu „mortigado“ estas tiam rigardataj kiel „spirite plej transformigintaj“, kaj ili mem estas firmigataj en tiu iluzio per la halucinoj kaj aliaj laŭsupozaj „ricevitaj gracoj“, kiuj reale estas nenio alia ol sekvoj de la fajna aŭ kruda torturado de la korpo.

La historio de ĉiuj religiaj sistemoj abundas je ekzemploj de tia erara opiniado, kaj bedaŭrinde ankaŭ je atestoj pri ilia glorado.

Kiom multe la homo eble admiras, ke iu liaspeca trovis la kuraĝon por torturi sin mem, tiom malmulte tia nehumaneco estas admirinda.

Ni homoj tie ĉi sur la tero nek vivas por prizorgi *nur* tion, kio je ni estas *animaleca*, kaj lasi nin konduki per la voluptavideco aŭ la komfortemo de la animala korpo, nek havas la taskon *torturi* la animalan naturon en ni.

Sed ni agas ĝuste, se ni edukas la terecan korpon tiel, ke ĝi fariĝas *esprimo* de la substanco spirito viviganta nin.

Tiucele nenio estas malpli taŭga ol memturmentado kaj korpa torturo!

Tie ĉi mi ne parolas kiel unu, kiu ne kapablas rifuzi ion al sia korpo.

En antaŭa tempo mem estinte ligita al la opinio, ke „fastado kaj asketado“ estas „plaĉaj al Dio“, mi dum multaj jaroj ne nur observis la antaŭpaskan kvardektagan fastotempon multe pli rigore ol pentanta monaĥo, sed ankaŭ en aliaj tempoj de l' jaro abstinis de ĉiu nutraĵo, krom fonta akvo.

Eble ekzistas homoj pli ekzercitaj en tiaj artoj, kaj mi volonte lasas al ili prioritaton, ĉar kiam mi vekiĝis en la spertado de la substanco, eterna spirito, mi perdis ĉiun ambicion sur la kampo de asketismo.

Ekde tiam mi scias, ke ĉiuj motivoj de asketa vivado baziĝas sur gravaj eraroj, kaj ke ekzistas nur *unu sola* legitima motivo por asketismo: la postulo fare de la terapeŭtiko, por la sanigo de la tera korpo mem.

La samo aplikiĝas al la persona inklino de unuopuloj al simpla, strikte malabunda vivmaniero, kondiĉe ke ĝi celas – fakte aŭ nur laŭsupoze – protekti la sanon kaj prosperon de la tera korpo.

Sed tuj kiam la motivo por tiu vivmaniero estiĝas el la opinio, ke asketa vivado povas proksimigi la homon al la eterna *spirito*, ĝi estas rifuzenda.

Tio, kion la atletoj de asketismo rigardas kiel „spertojn en la spirita sfero“, estas, sen ia escepto, de tre dubinda naturo!

Aŭ temas pri reagoj de la malfortigita korpo sur la *cerbon*, aŭ la mistraktita korpo jam fariĝis la predo de lemuraj potencoj de la nevidebla *fizika* mondo, kiuj propravole ne plu ellasas sian mizeran viktimon, sed penas distri lin per ĉio, kion ili trovas taŭga por ne vekti lian kritikkapablon el ĝia dormo...

Tio, kion la trompito tiam rigardas kiel spertadon de la *spirita sfero*, estas ekscitado de nervoj, kaj fantoma prezentado fare de duonanimalaj estaĵoj nevideblaj al la korpa okulo, kiuj apartenas al la fizika mondo, kvankam ilia ekzisto neniam povas esti „pruvata“ per iu ultramikroskopo.

Pri ilia vivado, ilia nature postulita aktiveco, kaj ties perversa ekscesiĝo rezulte de stimuloj faritaj de homoj, mi donis plej klaran informon en diversaj kunteksto en miaj libroj.

Kiu eble pensas, ke serioza diskutado de tiaj aferoj estus absurda, tiu ne suspektas, kiom *multaj* el liaj kunhomoj *pendas* en la piedkaptiloj de la nevideblaj *fizikaj* estaĵoj, pri kiuj mi tie ĉi parolas. –

Sed mi devas averti ne nur kontraŭ la asketa memtorturado de la tera korpo kaj la psikaj danĝeroj rezultantaj el ĝi, sed ankaŭ kontraŭ alia speco de memturmentado, al kiu multaj serĉantoj inklinas.

Certe ne temas pri la plej malfortaj inter tiuj strebantaj al la lumo, kiuj plejofte estas en la danĝero trotaksi siajn fortojn.

El tiu trotaksado ili opinias, ke ili povas trapasi sian vojon *per sovaĝaj saltoj*, kaj tute serioze pensas, ke ili povas atingi la celon en kelkaj monatoj, celon, por kies atingo aliaj bezonis multajn jarojn, pli ofte eĉ tutan homan vivon.

La furiozanta malpacienco de la cerba konscio volanta ekkoni tiom baldaŭ kiom eble, kiel la spertado de la substanco eterna spirito estas sentata, tiam estigas maltrankvilecon, kiu povas kaŭzi gravan *damagon* al la psika kaj fizika vivo, sed *neniam* kondukas al *tio*, kion oni, turmentate kaj preskaŭ malesperante, alstrebas. –

Ĉe tiu speco de serĉantoj la nenecesa memturmentado konsistas en senĉesa torturado de la cerbo, kiu ja devas veni en *trankvilon* kaj al tio, ke ĝi konscie *volas* pacience atendi, se oni vere suriru la vojon kondukantan „en la spiriton“. –

Malpacienco kaj senbrida sopiro ne nur *deflankigas* la serĉanton de la vojo, kiu kondukas al la celo, sed

ankaŭ pligrandigas la saman danĝeron esti trompata, kiu ekzistas por la asketo. –

Estas vere, ke iu diris, ke la „regnon de la ĉielo“ povas kapti nur tiuj, kiuj uzas „perforton“, – sed tio, kio tie ĉi estas nomita „perforto“, povas esti ĝuste ekkonata nur tiam, se oni konsideras kiel komparon la vortojn de Jakobo luktanta kun la anĝelo: „Mi ne forliberigos vin, antaŭ ol vi min benos.“

Ne temas pri „perforto“ en la senco de „povo subigi“, sed pri persista firmitenado, malgraŭ la scio pri la propra senpotenceco, malforteco kaj malgrandeco.

Sed se serĉanto sentas sin tiom ligita al tiu vorto, ke li ne kapablas liberigi sin de ĝi, tiam mi konsilas al li direkti la „perforton“, kiun laŭ sia opinio li ne povas malhavi, al la daŭra subigado de ĉiuj *malhelpaĵoj* estigitaj en lia senĉese cerbumanta kapo, kiuj volas malfaciligi al li la atingon de lia celo.

Kiu, kiel mia disĉiplo, iam suriris, laŭ la maniero konforma al li, la vojon al lia celo, vojon kiun mi montras al li, por tiu ne devas ekzisti *hastado*, *urĝiĝo* kaj *rapidado* al la celo!

Kun firma fido li devas vicigi unu paŝon post la alia, persistante kaj trankvile, ĉiam en sia propra maniero, kiun li trovis en miaj vortoj kaj tiam elektis, – ĉar tiu „vojo“ ne estas „forlasita“ post la finfina

atingo de la celo, kiel io, kion nun oni ne plu bezonas, sed fariĝas eterna spirita *posedo* de tiu atinginta la celon.

Li *bezonas* tiun ĉi vojon, nun „malfermitan“ *por* li, ĉar *per* li, se lia akirita eterna, spirita konscio restu unuigita kun tio, kio garantias al li la identecon en sia spirita kaj surtera spertado ...

La „trapaŝado“ de la vojo, kondukanta en la spiriton, estas „paŝado“ en la ekstera *tempo*, sed en la *propra* interna, spirita *spaco*.

Tiel ankaŭ la celo estas trovebla ja en la ekstera tempo, sed nur en la interna, spirita spaco. –

Tial ne utilas serĉi *ekstere*, kaj estas eraro pensi, ke la celo estas atingebla pli facile en unu loko ol en alia.

La parabolo de la „*vojo*“ por la antaŭenirado en la propra interno kaj dum la senĉesa paso de la ekstera tempo estas elektita tute ne arbitre.

Ekde plej antikvaj tempoj, ĉiuj instruantaj „el la spirito“ ree kaj ree atentigis pri tiu analogeco ekzistanta tie ĉi.

Kvankam la serĉanto trovos sian celon nur en la propra interna, spirita spaco, li tamen en la sama interna spaco povas esti ankoraŭ senfine *malproksima* de sia celo. –

Li devas „*migrante trapasi*“ la eksteran tempon, kiu tagon post tago pliproksimigas lin al la tago de atingo.

Temas pri senteblaj statoj de la sentokapablo, kiuj viciĝas unu post la alia.

Ĉiu sekvanta stato estas kondiĉita de la antaŭa kiu atingis la konscion, kaj neniu eble povas esti „transsaltata“ aŭ ellasata!

Do estas ankaŭ nenecesa memturmentado, kiam la serĉanto maltrankviliĝas pro tio, ke li progresas nur malrapide, aŭ ĉar li klare konscias, ke li ankoraŭ staras je la komenco, dum li preferus sperti la tagon de atingo jam hodiaŭ.

Sed estas vere *progresige*, se oni scias, *kie* oni reale staras, dum la tro gaje optimisma fido, ke oni probable jam trairis la plej grandan parton de l' vojo, povas ŝanĝiĝi en fortan desapontiĝon ...

Kelkaj, kiuj jam opinias, ke ili estas miaj disĉiploj, ĉar ili „konas“ ĉion, kion mi skribis, eĉ pliakraigas sian nenecesan memturmentadon per tio, ke ili provas akceli sian propran iradon per ofte tre dubindaj stimuloj el ĉiaspeca filozofia aŭ okultisma literaturo, kiu havas absolute neniun rilaton al *tio*, kion *mi* instruante envortigas, nek koncerne la manieron de strebado, nek koncerne la atingendan celon, kvankam

la *vortoj* tie uzitaj eble apartenas ankaŭ al *mia* lingvaĵo.

Ridetante, kiel oni rigardas malsaĝan faradon de infanoj havantaj nematuran juĝkapablon, mi povus preterpasi tiujn provojn „mem iomete akceli la aferon“ per tio, ke oni aldonas el alia loko tion, kion laŭ ilia opinio mi retenis, se mi ne ĉiam devus vidi, kiel tiuj fervoruloj mem baras al si la vojon ...

Tial mi vole nevole devas, en la propra intereso de la serĉantoj, plej klare demeti ĉian respondecon pri tio, kio rezultas el tia „superprudenta“ kungluado de io neniam akordigebla, kaj necese kondukas al la plej kruda memtrompo de tiuj propraaŭtoritatuloj.

Kiu tamen opinias, ke li memstare progresos pli bone, ol se li sekvas miajn instruojn, donitajn en la scio pri mia eterna respondeco, – kaj sekvante ilin *tiel, kiel ili estas donitaj*, – al tiu estu konsilate, ke li lasu miajn librojn nelegitaj, por ke li almenaŭ ne kulpiĝu pri ilia misuzo.

Sed iu aŭ alia, kiu sentas sin kiel mia disĉiplo, kvankam li mencias dum unu spiro tion mian kune kun ĉiuspeca nerespondeca pensokonfuziĝo, eble tamen povus preni instruon el tio, ke inter la disĉiploj agnoskitaj de mi, kiujn mi vidas plej fore progresintaj, estas eĉ ne unu, kiu ne en plej rigora memdisciplino

sekvis, en sia strebado, *ekskluzive* la instrukciojn donitajn de mi.

Tio certe ne estas miriga, ĉar la instruoj, kiujn mi envortigis, estas provitaj ekde antaŭ jarmiloj.

Sed estas kontraŭe al ĉiu spirita konsekvenceco, opinii, ke oni atingas ankoraŭ pli ol estas atingebla per la instrukcioj entenataj en miaj libroj, se oni samtempe servigas al si kiel gvidilon ĉian homan opiniadon kaj supozadon.

Neeviteblaj malfacilaĵoj

Ĉiu homa komuniko kiu originas el regionoj ne ĝenerale alireblaj, devas kalkuli kun malfacilaĵoj kiel en ĝia transmetado, tiel ankaŭ rilate al la enprenkapablo de la adresatoj.

Tiuj malfacilaĵoj estas pliakrigataj, kiam temas pri raportoj pri spertoj, kiuj estas *aliaj* ol tio, kio estas ĝenerale spertebla, tiel ke rekta komparo restas preskaŭ neebla, kaj interkompreno ebligas nur per parafrazo, metaforo kaj parabolo.

Estas tute sendube, ke ĉe tio, kion mi venas por diri, ekzistas ĉiuj ĉi malfacilaĵoj.

Se mia instrua verkaro celus nur aziajn popolojn, al kiuj multaj nocioj, kies konon mi devus premissi, estas *vivaj* ekde antaŭ jarmiloj, se ili ne eĉ apartenas al la praheredaĵo de la gento, tiam miaj devo kaj tasko estus multe pli facilaj; tamen, tiuj malfacilaĵoj tute ne estus forigitaj.

Ili nur *ŝanĝiĝus*, per tio, ke la miskomprenoj de miaj paroloj povus alporti al si laŭsupozan konfirmon el *aliaj* religiaj kaj filozofiaj imagomondo.

La viroj, pri kiuj mi devas paroli kiel pri miaj spiritaj „fratoj“ kaj kiuj vivas senescepte en *Azio*,

kvankam ne *ĉiuj* estas aziaj *arjoj*, scias tion tute precize, kaj tial opinias, ke estus *ofero*, kiu ne alportus la respondajn fruktojn, se oni eĉ nur *prove* prezentus la saman instruon al iliaj popoloj.

Ili eĉ opinias, ke mia instruo povus multe pli facile *deire de Eŭropo* atingi ilian hejmlandon kaj tie kapti, en konsiderinda mezuro, la animojn maturajn por ĝi, ol ke estus eble por aziano – kiu volus diri tion saman, kion mi havas por prezenti en miaj libroj – distancigi la multajn *erarojn* rezultantajn el religiaj imagoj, kaj la groteskajn *interpretojn* fare de mirakloavida *superstiĉo*, kiuj tuj sekvos lian memmalkaŝiĝon.

Tia estas la situacio eĉ *tie*, kie ekde antaŭ jarmiloj sennombraj homoj, ja *dissemitaj* tra kontinentgrandaj landoj, *scias*, rezulte de hereda sciigo kaj mematingita disĉipleco, pri la aferoj, kiujn mi penas prezenti en miaj libroj en formo komprenebla al la eŭropa kultur-rondo. Tiom pli certe la instruo disvastigita de mi devas atendi renkonti, sur la *okcidenta* duono de l' terglobo, gravajn, kvankam *alispecajn* malfacilaĵojn en la homaj cerboj.

Sed mi rigardas tiujn malfacilaĵojn tute ne kiel „nesupereblajn“. Tamen mi devas konfesi, ke mi ne povus liberiĝi de mia instrua tasko, eĉ se mi rigardus mian instruan verkaron kun pesimismo kaj dubus pri ĝia realigeblo.

Se mi ne estus tiu, kiu mi ja *estas* sen mia surtera farado, certe ankaŭ *mi* probable ekvidus grandajn malfacilaĵojn en mi, se mi renkontus, nepreparate kaj kiel homo alkatenita al tradiciaj *aprioraj supozoj* de religia aŭ filozofia speco, la verkaron, kiu hodiaŭ portas mian nomon.

Neniu pensu, ke mi eble mem ne povas kunsentante kompreni, kiom malfacile estas hodiaŭ por okcidenta homo – plenigita ĝissupre per ŝajne absolute certa scio pri la kaŭzoj de ĉia okazado – dekomence eĉ nur „preni serioze“ ĉion, kion mi havas por diri al li aŭ ŝi!

Mi mem ja estas homo de tiu ĉi transira tempo, konas ĝiajn kampojn de klerigado, la formojn de ĝia scienca pensado, ĝiajn verajn meritojn kaj tro certajn ambiciojn, sed – mi ne povas malkonfesi ĝin – aldoniĝas la fakto, ke mi, rezulte de la substancaj *spiritaj* organoj aktivantaj en mi, kapablas travidi ankaŭ interligitecojn kaj aferojn, kiujn povas travidi *ne* ĉiu homo, eĉ se li pensas esti plej certa, ke nenio povas kaŝi sin antaŭ lia sagaceco.

Mi do scias tre bone, kiujn *malfacilaĵojn* eŭrope aŭ amerike bredita pensado devas superi, se ĝi volas vere ekkapti tion, kio estas prezentita en la instruaj tekstoj de miaj libroj: – *prezentita* en miaj vortoj, sed vere ne *elpensita* de mi, sed trovita en la eterna spirito, kie ekde la komenco de la disvastiĝo de homoj sur tiu ĉi

planedo ĝi estis alirebla al ĉiuj, kiuj povis alkalkuli sin al mia speco.

Ke tiuj homoj ĉiutempe estis nur *tre malmultaj*, estas la sekvo de spirite postulita neceseco.

Sed la krania volbo de homaj kapoj tute ne formas hermetikan fermaĵon de la cerboj kontraŭ cerbe percepteblaj eksteraj vibroj, – kaj la fortoj organe konsistigantaj la animon neniam estas izoleblaj tiom perfekte, ke ili fariĝus nealireblaj al tio ĉiokonscianta, ĉiosentanta, ĉiospertanta en la nemezurebla maro de *neligitaj* animoelementoj.

Tiel rezultas, ke al ĉiu homo estas *konata* multe pli ol li scias, eĉ se tio ĉi „konata“ unue bezonas alvokon por atingi la konscion, indiferente ĉu tiu „alvoko“ estas vorto, videbla objekto, aŭ interna spertado.

Al nekripliĝinta animo do estas jam „konata“ multe pli el tio, kion mi havas por alporti al ĝi, ol la nur cerbe lumigita homo povus imagi al si ĉe la lumo de sia ĉiam malkviete flagranta lumfonto...

Sed por eviti eble ekaperontajn erarojn, mi devas emfazi, ke la nocio de „*nekonscio*“, tio kuŝanta sub la „sojlo de konscio“, aŭ la nocio de „kolektiva konscio“, – nocioj, kiuj rezulte de la popularigo de la psikoanalizo kaj ĝiaj branĉoj nuntempe fariĝis preskaŭ modaj vortoj, – neniel konformas al tio celita de mi ĉi tie.

Tute ne temas pri io, kio iam estis alirebla al la cerbokonscio, kaj tiam *perdiĝis* al ĝi, – sed pri io konata al la eterna *animo*, kio ankoraŭ ne povis esti enprenata de la cerbokonscio.

Oni plej bone evitos la danĝeron doni sin al eraraj imagoj, se oni trankvile akceptas mian manieron priskribi ion spertitan, kaj tute ne provas adapti tion de mi prezentitan al scienca terminologio, kiu konstante ŝanĝas la nocian enhavon de siaj terminoj.

Mi certe kapablas konformigi min al tia terminologio, sed mi sentas min pli bone, se mi lasas al mi la liberecon elekti la vortojn, kiel rimedojn de interkompreniĝo, nur laŭ ilia taŭgeco *sentita de mi* kaj kunordigi ilin al la miaj, ne tro zorgante pri ilia konvencia valoro.

Kelkaj malfacilaĵoj jam estas forigitaj, se oni konsciigas sin pri tio, ke mi *antaŭ ĉio* kalkulas kun tio supre karakterizita de mi – tio ankoraŭ ne kaptebla al la cerbo, sed jam „konata“ al la animo – kiel faktoro de interkompreniĝo.

Se la leganto de miaj libroj kapablas certgrade rezisti – provizore – la ĉiam arogantan kontraŭargumentadon de la intelekto, sensuspekte tiom „*certa*“ pri si mem, tiel ke tio „konata“ al la animo, kvankam ankoraŭ ne proksimiĝinta al la cerba konscio, entute *povas* esti alvokata, tiam li mem malfermis al si la

alirejon por atingi la vojon „en la spiriton“, kiun miaj vortoj montras kaj instruas iri.

Tiam li preskaŭ certe ne plu renkontos apartajn „malfacilaĵojn“, kondiĉe ke li vere posedas la *persistecon*, kiu estas nepre necesa antaŭkondiĉo por ĉiu, kiu volas ekiri la vojon en la spiriton.

Tio, kion mi havas por komuniki, certe devas esti bonafide akceptita tiom longe, ĝis la disĉiplo mem ekhavis internajn spertojn, kiu *ebligas* al li fari juĝon.

La serĉanto certe devos, en sia propra intereso, siamaniere klarigi al si tion, kion mi rekomendas al li en miaj instrukcioj, kaj ne devos *miksi* ĝin kun *aliaj* instrukcioj, indiferente el kiu ajn fonto ili alfluas al li.

Se la sekvado de miaj konsiloj estu utila al la disĉiplo, kiu volas veni al *propra* sperto, li provizore lasu neatentitaj eĉ instrukciojn, pri kiuj ne estas permesita eĉ la plej milda dubo, ke ili devenas de la plej honestaj kaj noblaj homoj.

Nur kiam li mem *akiris* tion, kion akiri ebligas al li, la saĝaj konsiloj, kiujn li trovas ekzemple en la *mez-epoka* kaj la – alikolora – *orienta* mistikoj, fariĝos kaptebla al li en sia tuta profundeco.

Sed li samtempe ekkonos la multajn *erarojn*, kiuj neintence miksiĝis kun tiuj ĉi sciigoj pri la vero, kaj li tiam, malgraŭ sia solena respekto al la atestoj de homoj proksimaj al aŭ unuigitaj kun la spirito, ne

bezonos heziti *apartig* disde la vivĝerma „tritiko“ la „grenventumaĵon“, eĉ se tiu ĉi ekzistas pli abunde ol li antaŭe suspektis.

Sed *antaŭ* ol li atingis tiun ŝtupon, li agos bone, se li portempe forgesas ĉiun tian instrukcion, kiu eble estas konata al li.

Ke li devas por ĉiam flankenmeti la disvolviĝo-receptojn de modernaj mistagogoj, kiujn li eble ĝis nun sekvis, estas evidentaĵo.

Se mi nun postulas por tio, kion mi skribis, certan konfidon, antaŭ ol la propra juĝkapablo de la disĉiplo povas estiĝi, tio tute ne signifas, ke „kredo“ en la senco de definitiva decido estas postulita, sed nur la sama *volo konfidi*, kiun oni montras ekzemple al altmara kapitano, pri kiu oni senhezite supozas, ke li konas la marvojojn kaj kapablas alporti la homojn konfidentajn al li en la ĝustan havenon, – aŭ al montara gvidisto konscia pri sia respondeco, kiu tre bone scias, ke la vivo de la turisto dependas de lia preciza kono de la vojo kaj lia juĝkapablo.

Kiel oni koncedas al la montara gvidisto la rajton doni konsilojn pri la plej bona agmaniero dum la rokgrimpado, aŭ jam dum la malfacila irado trans glaĉeroj, – tiel kaj ne alie mia disĉiplo devos aprobi la konsilojn, kiujn li renkontas en miaj libroj.

Mi konas la *danĝerojn* sur lia vojo, kaj povas konsili al li, kiel ili povas esti *superataj*.

Aliaflanke, nenio estas al mi pli malproksima ol la postulo pri blinda „sklava obeemo“, por kiu mi ne donus al mi rajton, kaj kiun mi ne povus rigardi, de iu ajn starpunkto, kiel estantan en la intereso de l' disĉiplo aŭ nur kiel dezirindan.

Se iel *eble*, la serĉanto sciu, aŭ almenaŭ povu imagi, kion li povas esperi, kaj *kial* mi devas doni al li tiun aŭ alian konsilon, – *kial* mi avertas lin kontraŭ iu danĝero.

Estas en miaj libroj multego, kiun konfidi al la skribo estis *nedireble peze* al mi, ĉar ĝi devigis min tuŝi per sekaj vortoj tion, kion mi mem suferis, spertis aŭ ricevis kaj kion mi sentas tiom nepriskribeble alte super ĉio alia surtere spertebla, suferebla aŭ ricevebla, ke mi aŭdacas proksimiĝi eĉ al la *rememoro* pri ĝi nur post inda prepariĝo ...

Mi estus povinta evitigi al mi la „memfrakasadon“, kiu estis necesa por prezenti eĉ nur unu el la frazoj, al kiuj mi tie ĉi aludas, se mi povus aliamaniere plenumi la spiritan devon, peri al la serĉanto kvazaŭ „stereoskopan“, plastikan enrigardon en spiritajn aferojn.

Ĉiuj ĉi aferoj estas prezentitaj al la leganto de miaj libroj nur pro tio, ke li ne sekvu en nura fidemo la konsilojn, kiujn mi havas por doni al li, sed *per libera*

decido antaŭ sia konscienco, post kiam estis ebligite al li, kompreni almenaŭ en sia imago la spiritajn interligitecojn, sur kiuj miaj konsiloj baziĝas.

Sed senindulge mi devas insisti, ke la serĉanto bazu sian decidon *nur sur la tekstan enhavon de miaj libroj*, kaj lasu mian eksteran personon tute neatentita!

Se li volas esti mia disĉiplo, li devas scii, ke mi prezentis min al li en miaj instruaj tekstoj *sen ia rezervo*, kaj ke li estas „*mia*“ disĉiplo nur en la senco, ke li kapablas esti *disĉiplo de tiuj ĉi instruaj tekstoj*, kies *absoluta* vero, kiel prezento de la realo de l' substanca spirito, povus same malmulte esti iam skuata, *se tiuj ĉi libroj ne estus skribitaj el plej profunda spirita respondeco* fare de homo *plene reganta sin mem*, sed – se tio estus *ebla* – fare de *malsaĝulo!* – –

Mi petas la leganton konsideri, ke mi ĉie, kie mi parolas pri la *substanca* spirito – kontraste al la vorto „spirito“ signifanta la homan *intelekton* kaj la esprim-aĵojn de la *cerbaj moviĝoj* – , mi volas, ke oni komprenu sub spirita „substanco“ *tion plej realan*: la tuton de ĉiuj praesto-elementoj!

Tiu ĉi spirita „substanco“ estas nenio rigida, sed el si mem *tio plej libera*, malhelpebla de nenio, *eterne movebla, eterne moviĝanta*.

Ĝi ne estas „kreita“, sed – *sen* aparta ago de volo – *donita* per la nura ekzisto de la „*praesto*“, kiun vorton

mi devas uzi por nomi tion plej internan de tio, kio „estas“, se ĝi estu nomata.

Ankaŭ la *plej subtilaj* fortoj de la universo, hodiaŭ apenaŭ suspektataj de geniaj teoriistoj pri fiziko, estas kvazaŭ nur speco de „efiko de indukto“ de la spirita „substanco“ menciita de mi, dum la „pli krudaj“ teraj fortoj, ekzemple ĉio, kion ni nomas elektraĵoj aŭ magnetaj fenomenoj, estas kvazaŭ nur *reflektaj efikoj* de tio, kion mi nomas „efiko de indukto“, analoge al la indukta bobeno, en kiu estiĝas *nerekte* kaŭzita elektra kurento.

Estas neeble al mi, tie ĉi esprimi min pli klare, sed mi havas kaŭzon por supozoj, ke la venonta scienca esplorado atingos tere pruveblajn ekkonojn, kiuj tion, kion mi diris kvazaŭ nur balbutante, enmetos en tute novan, ampleksan kadron de prezentado.

Sed la reala *konsciiĝo* en la substanco de la eterna spirito staras *ekster* ĉia scienco, kaj eĉ la plej grandaj kaj plej altaj sciencaj ekkonoj *neniam* povos alproksimigi homon al la *spertado* de la substanca spirito eĉ je la larĝo de haro.

Oni certe komprenos, ke la serĉanto, kiu volas veni „en la spiriton“, bezonas – aparte de la montranto kaj vojpreparanto, kiel kiu mi devas agi en mia instrua verko – ankoraŭ *alian* helpon, tuj kiam li, kvankam preskaŭ superabunde instruita, troviĝas sur la vojo.

Sed tiu helpo estas tiam prezentita, kaj por havigi ĝin al si, oni bezonas nur la internan teniĝon de fido de homo anticipe dankanta.

Sed homon povas helpi neniu „dio“ senpere, sed nur *homo*, kaj se temas pri „dia“ helpo: nur homo, kiu fariĝis transformatoro de substancaspiritaj fortoj.

La spirita helpo, kiu atingas la homon, estas *adaptita* al lia enprenkapablo, kaj *restas* adaptita al ĝi, ĝis li mem kapablas sperti tion eternan substancaspirititan en sia spirita organismo vekita el latenteco, indifere, ĉu la procezo necesa por tio povas esti finita jam dum la surtera vivo aŭ – kiel plej ofte – estas nur komenkata tie ĉi, por esti kompletigata en postteraj statoj de spertado.

Tie ekzistas *sennombraj* diversaj ŝtupoj de disvolviĝo, kaj la samo aplikiĝas al la sole ebla, vere *reala* Dio-sperto, kiu povas doniĝi al la homo: la spertado de la „vivanta“ Dio en la propra animo. –

Tiu ĉi unika, vere „reala“ Dio-sperto (–„Dio“ estas ne nur „spirito“, sed kvazaŭ la plej subtila memformaĵo de la spirito –) estas atingebla ne nur *post la perfektigo* de la substancspirita organismo; tamen tiu ĉi organismo devas fakte esti „vekita“, tiel ke ĝi jam povis eklumigi en la animo la klaran konscion pri la identeco de la „*mi*“, kiu estas la unika formo de spertado en ĉiuj eternaj sferoj.

La homo, al kiu tiu spertado vere doniĝas, ne plu *demandas*, kaj ne plu *povas* demandi, ĉu li vere *atingis* ĝin, aŭ ĉu li subfalas nur al memtrompiĝo, ĉar tio, kion li spertas, traradias lian mi-formon per la *neatakeble plej sekura certeco*, kiu ekzistas en tempo kaj eterneco.

Sed kiu – eĉ se nur en siaj mallumaj horoj, kelkfoje ne eviteblaj dum la surtera vivo – ankoraŭ vidas sin konfrontita de la demando, ĉu lia sublimesperto estis io *reala*, tiu povas esti certa, ke li mem *arbitre iom progresigis* la aferon eble per dubinda rimedo, kaj tial kaptiĝis en unu el la multaj kaptiloj de memtrompo, el kiu li liberigu sin tiom baldaŭ kiom eble, se li tamen volas ankoraŭ atingi la *realan* spertadon de sia vivanta Dio ...

Krome, tiu ĉi sole *ebla*, reala Dio-sperto ne signifas, ke la animo estas subite elmetata al sperto-devigo, kiun ĝi apenaŭ povas elteni, sed kie ajn tiu sperto okazas, tie ĝi estas konforma al la persona naturo de la homo.

Tial estas dirite en miaj instrulibro, ke ĉiu povas sperti nur *sian* vivantan Dion, kaj ke li *neniam*, tie ĉi surtere kaj en la eterneco, kapablas montri *sian* vivantan Dion al sia frato.

Ĉiu provo okazigi tiun spertadon „*perforte*“, *nepre* rezultigas memtrompon.

Sed se oni volas, pro pliklarigo, menciĝi tie ĉi la vorton „graco“ – tiom misuzita (kaj tial preskaŭ neniam uzita de mi) – kaj kompreni ĝin tiel, ke ĝi signifas *feliĉigon*, por kiu oni plenumis *la antaŭkondiĉon*, tiel ke tiu ĉi feliĉigo *devas* okazi, ĉar ĝi ne *povas* esti retenata de *iu*, eĉ ne de *dia* volo, – tiam oni vere proksimiĝas al la kompreno pri tiu spertado...

Ĉu homo kapablas havi tiun sperton *unufoje*, ĉiam *denove*, aŭ daŭre kaj *seninterrompe*, dependas nur de li mem – de liaj animaj eblecoj, sed ĉiu, al kiu ĝi doniĝis en la maniero ebla por li, eniras per tio en novan vivon kaj trovas sin en renoviĝo, kiun li povas nur *senti*, sed neniam prezenti per vortoj.

Dinamika fido

Verdire, estas banala vero, ke ĉia homa strebado *sukcesas* nur tiam, se staras malantaŭ ĝi la *fido* pri la *ebleco*, eĉ la *certeco* de la sukceso.

Kiu ne spertis tion *je si mem* – kaj ekzistas nur *malmultaj*, kiuj ne devis sperti tion ree kaj ree en la paso de sia vivo – tiu ne bezonas longe serĉi en sia ĉirkaŭaĵo por trovi homojn, kiuj liveras al li kaj *ekzemplon* kaj *kontraŭekzemplon*.

Plej forta talento, kiu rajtigis onin al altaj esperoj, malsukcesas kaj ne atingas sian celon nur pro tio, ke mankas la *fido* pri la propra forto, dum apude homo de apenaŭ meza talento paŝas de sukceso al sukceso, gvidate de la *fido* pri sia povo...

Kaj kiom ofte ideo, por kies realigo elsangadis tuta vivo, estis kondukata al venko nur post la morto de sia kreinto, enmanigite de nekreivaj naturoj, kiuj ja havis la fidon, kiu mankis al la malsukcesa iniciatinto malgraŭ lia energia strebado. – –

Kvankam tia sperto estas vere facile atingebla, oni tamen povas renkonti sur ĉiuj stratoj sennombrajn homojn, kiuj ja havas sufiĉe bonan volon kaj strebas

kun plena tenaceco al iu celo, sed mem apenaŭ *kredas*, ke ili iam povas *atingi ĝin*.

Ĉu estas mirige, ke nur tiom malmultaj atingas *tiun* celon, al kiu mi montras la vojon en ĉiuj miaj libroj, kaj kiu ja estas atingebla al ĉiuj, kiuj portas en si la *fidon*: – la *fidon al si mem!*? –

Diras la veron la proverbo: „*Helpu vin mem, tiam helpas vin Dio!*“

Tiu ĉi proverbo tute ne *dubas* pri Dia helpo, sed indikas la *kondiĉon*, kiu devas esti plenumita, se Dia helpo estu *ebligata*. – –

Tial ĉiu laŭdira „fido al Dio“ estas nur memtrompo tiom longe, dum ĝi ne estas rajtigita per la rokfirma *fido al si mem*.

Sed *fido* estas *volo*, kaj tiuj scias nenion pri la „fido“, kiuj ne konas ĝin kiel formon de la *volo*.

Tamen tie ĉi devas esti avertate kontraŭ la malsaĝo, kiu rigardas la obstinan kaj trostreĉitan *deziron* kiel „volon“. –

La komuna lingvouzo eble ankaŭ parolas pri „volon“ tie, kie nur senbrida deziro strebas al celo, dum la *volo*, kiu povus atingi ĝin, profunde dormas.

Sed se oni diras: „fido estas volo“, oni plue devas diri: – volo, kiel tie ĉi postulita, estas nenio alia ol la *alta forto de „imagado“*, per kiu la homo *formas* en sia interno la formon de sia sorto, ĉu rilate al sia

ekstera ekzisto aŭ rilate al la atingado de sia plej alta celo en la *spirita* mondo. – –

Oni scias tion jam delonge tie, kie temas pri la kuracado de malsanoj de la *korpo*, kaj prudentaj kuracistoj celas antaŭ ĉio liberigi la *volon* de l' paciento al saniĝo disde la katenoj, per kiuj la malsanulo mem ligis ĝin.

Ĉu „miraklaj“ sanigoj alportis altan renomon al la *sanktejo de Asklepio en Epidaŭro*, aŭ ĉu hodiaŭ *Lurdo* havas la saman renomon por siaj kredantoj: – en ambaŭ okazoj la stimulado de la *volo* al saniĝo, la ekigo de la *imagado*, la *fido* al la *ebleco* de la saniĝo estas la „miraklofara“ aganto, eĉ se ĝi plenumas nur la antaŭkondiĉon de tio, ke la vojo estu liberigata al helpantaj fortoj de *alia* speco. –

Krome, en ĉiuj tempoj oni aŭdis ne nur pri „*sanktaj*“ *lokoj*, kie malsanuloj trovis saniĝon, sed ankaŭ pri *homoj*, kiuj sciis sanigi homojn en okazoj, kie pocioj kaj miksturoj estis senefikaj. La „miraklo“ en la ofte benoplena efikado de tiuj homoj konsistas nur en tio, ke ili sukcesis vekti la veran *dinamikan fidon* en la malsanuloj, la fidon, kiu estas „*volo*“ al saniĝo kaj metas la bildon de la regajnda *sano* en la loko de la bildo de malsano, kiun antaŭe kreis la sama – sed misgvidita – volo.

Certe, en *neniu* tempo *ĉiu* malsano estis tiumaniere kuracebla, kaj entuziasmuloj tro facile pretervidas, ke kaj homaj *kuracantoj* kaj „*sanktaj lokoj*“ de piaj kredantoj devis lasi foriri ne malmultajn suferantajn malsanulojn *nekuracitaj*, aŭ iom resaniĝintaj nur laŭ la momenta *ŝajno*.

Sed nur malsaĝo volos kontesti, ke la forto de l' *fido* kapablas efiki sur la korpon de homo en tute miriga maniero. –

Tamen tio, kion la dinamika fido ebligas tie, kie temas pri efikado sur la *korpon*, estas multe *superata* de la efikoj, kiujn la bone gvidata fido kapablas estigi en la *nevidebla organismo de la spirito*. – –

Kiel la *korpe malsana* homo, kies malsano estas de speco, kiu povas esti kuracata per la fido, devas starigi en si la bildon de *saneco*, uzante la saman forton, per kiu li antaŭe starigis en si la bildon de la malsano, tiel same la serĉanto, kiu volas atingi *sian plej altan celon en la regno de l' spirito*, devas krei en si mem per la forto de l' *fido* la spiritan formon, en kiun li volas ŝanĝi sin ...

Neniam eĉ la plej arda *deziro* faris el *serĉanto trovanton* en la regno de l' spirito.

Ankaŭ tie ĉi la *ebleco* trovi devas esti fariĝinta *certeco*, antaŭ ol la alta celo povas esti atingata.

La fido je si mem estas la sola efika *volo al Dio*, kaj nur tiu ĉi formanta volo starigas „la bildon de tio, kio li fariĝu“, en la interno de la serĉanto. –

Laŭ tiu ĉi bildo la nevidebla spirita organismo de la serĉanto tiam ŝanĝiĝas tiumaniere, ke ĝi fariĝas pli kaj pli *kapabla* trovi.

Malĝusta instruo kaj plej granda *manko de fido al si mem* misgvidis la kredon de la plej multaj al tio, ke ĝi starigis en ilia interno bildon de ili mem, kiu montras estaĵon laŭnature *ekskluditan* disde plej alta kaj certa ekkonado; kaj *ĝuste gvidata* fido devas anstataŭigi tiun eraran bildon per la bildo de *vokito* – de homo *vokita al unuiĝo kun Dio!*

Fido kaj certeco, ke lia plej alta celo estas por li *atingebla*, antaŭ ĉio devas fariĝi viva en homo, se li vere volas proksimiĝi al la regno de la esenca, pura spirito kaj al tio, kio tie atendas lin.

Ĉia *timemo* estas malbona, ĉar la eterna savo tute *ne* povas esti ellaborata „kun timo kaj tremo“, kvankam ekde antaŭ jarmiloj oni atribuis gravegan signifon al tiuj ĉi vortoj, senfine malproksimaj de ĉia realo.

Sennombraj homoj serĉis dum sia tuta vivo kaj tamen ne povis trovi, nur pro tio, ke ili fidis tiun malbonan vorton kaj tiel subpremis en si ĉian *memfidon*.

Sed sen la *fido*, pri kiu mi tie ĉi parolas, neniuj tera homo kapablas reveni *en la spiriton*, kaj tiu ĉi dinamika *fido* povas efektiviĝi en ĝusta maniero nur tiam, se la homo havas la plej firman, neskieblan *fidon al si mem* – fidante, ke li estas kapabla atingi sian *spiritan* altan celon.

Ĉia spirita, alta helpo, kiu estas konstante prezentita al la homo, por ke ĝi donu al li tion, kio ankoraŭ mankas al li, kiam li, el tera mallumo, ekiras la vojon al la lumo, restas tute *senpotenca* tiom longe, dum *la fido al si mem* ne efikas en la serĉanto. –

Nur homo, kiu fidus *sin mem*, kapablas fidi ankaŭ la altan *helpon*, kiun li ne povas malhavi sur sia kruta alta pado.

Nur homo, kiu fidus *sin mem*, kapablas havi la ĝustan dinamikan fidon: – havas la *volon* al sia savo, liberiĝinte de la nura *deziro*!

Ĉe ĉiuj miaj instrukcioj kaj konsiloj mi premisas, ke mia disĉiplo *diru tiun „jes“ al si mem*, malgraŭ ĉiuj malfortaĵoj kaj mankoj, pri kiuj li mem ja sciu.

En multaj lokoj de miaj libroj estas montrate plej klare, kiel la homo unue devas certiĝi, ke li *originas* el la eterna substanca spirito, antaŭ ol li povas nutri la esperon *reveni „en la spiriton“*.

Eĉ ne estas *eble* al la serĉanto, malgraŭ lia plej bona volo, uzi la instrukciojn donitajn de mi, tiom longe,

dum li ankoraŭ ne kreis en si la firman fidon al si mem kaj al sia eterna spiriteco.

Sed tie ĉi fido ne devas signifi, ke oni *opinias* ion vera, aŭ ke oni nur *supozas* ion.

Nur la *dinamika* fido: – tiu ĉi fido, kiu *estas* forto kaj *estigas* el si forton, – povas doni la internan *certecon*, kiun devas posedi ĉiu, kiu volas ekiri la vojon al la spirito.

Kontraŭe, la „kredado“ je iuj *imagoj* – indiferece, ĉu ili konformas al la realo aŭ ne – estas pli malhelpo ol helpo. –

Mi provas prezenti per vortoj la mondojn nepercepteblajn al la fizika okulo ne por helpi krei imagojn en la cerbo de la disĉiplo, sed por ebligi al li antaŭe kompreni la postulojn, kiujn mi devas meti al la agovolo de la serĉanto en lia propra intereso.

Kie oni supozas trovi „*memkontraŭdiraĵon*“ en tiaj priskriboj – kio kelkfoje ne estas malfacila –, tie oni portempe ne plu okupiĝu pri ĝi, ĝis la propra *dinamika* fido instruas solvi la ŝajnan eraron.

Dinamika fido estas sekura *en si mem* kaj neniam povas esti skuata per la misinterpreto de vorta bildo.

La plej granda obstaklo

La plej granda obstaklo sur la interna vojo de la serĉanto estas ne skeptikeco hipertrofia kaj preta juĝi tro rapide, sed *timo*, kiu lin premas sub plej diversaj maskoj.

Eĉ la laŭsupoza skeptikeco estas plejofte timo, kiu provas kaŝi sin sub la masko de dubemo.

Timo, ke oni povus subfali al eraro aŭ eĉ al io pli malbona, – *timo*, ke oni devus revizii sian mondbildon, – kaj fine *timo*, ke oni povus esti priridata de aliuloj.

La homoj tro volonte indikas al si reciproke grandajn kaj rimarkindajn motivojn por sia farado, dum kaŝiĝas malantaŭ ĝi nur ia formo de *timo*.

Aŭ ili sin kaŝas for de la timo malantaŭ vantaj pretekstoj, por ne devi vidi ĝin ...

Ekzistas en la mondo pli da viktimoj de la *timo*, ol terura epidemio iam postulis por si!

Ne estas mirige, ke ankaŭ homo, kiu serĉas sin mem kaj sian *vivantan Dion* kaŝite tronantan en li, estas premata de diversaj formoj de timo kaj suferas de ĝi grandan malhelpon.

Ne por ĉiuj estas tute facile venki ĉian timon, – sed estas multe pli facile ol *malkovri* la timon sub ĝiaj multaj, tre efikaj *maskoj* ...

La serĉanto ne povas tro sufiĉe ekzameni, ĉu malantaŭ tio, kion li nomas siajn kaŭzojn, siajn motivojn, siajn intencojn, kaŝiĝas iu formo de *timo*.

Se li pretervidas nur unu tian maskon, li havas kvazaŭ malamikan estaĵon „en sia propra domo“, kaj ne kapablas elpeli ĝin, ĉar li ne *ekkonas* ĝin kiel tian.

La timo estas respondeca pri multe pli da malsaĝaĵoj kaj kruelaĵoj en la mondo, ol la timuloj suspektas kaj pretas koncedi. –

Kien ajn oni rigardas, tie oni ekvidos malantaŭ la decidoj de homoj tre ofte la *timon!*

Timo pri tio kaj tio ĉi, – timo pri mil diversaj aferoj, – timo sub la plej trompaj maskoj.

Ĝi turmentas la serĉanton precipe en la formo de „*timo de konscienco*“, ĉar li ne kapablas kompreni, ke, *malgraŭ* liaj malfortaĵoj kaj mankoj, la aliro al la spirito estas libera al li.

Tamen, „timo de konscienco“ ne ĉiam rilatas al la *konscienco*.

Sed „timo de konscienco“ havas tromulton „sur sia konscienco“, per kio konscienco neniam estus ŝarĝinta la homon. –

En tiaj portempaj mizeroj la serĉanto agas prudente, se li dum certa tempo lasas sian internan disvolviĝon *neatentita*, kaj en nenia maniero okupiĝas pri *si mem*, ĝis li sukcesis *venki* la evidentan aŭ kaŝitan *timon*, kaj ĝi tiam forlasis lin.

Li per tio ne suferos la plej etan *perdon*, ĉar: – neniam io *bona* povas rezulti el la timo.

Kiam la timo forlasis lin, – indifere, en kiu formo ĝi venis al li, – tiam li ekkonos, ke dum la memsurmetita tempo de atendado lia disvolviĝo tute ne reale estis interrompita.

Timo ekzistas nur tie, kie manko de fido pri la propra rajtigiteco povis estiĝi, – sed en tempoj de tia manko de fido al si mem, oni ne volu labori je si mem!

Vane oni traserĉos la tutan mondon por trovi ian progresigan faron, kiu rezultis el *timo*!

Tie, kie oni asertas, ke iu bono originis el iu *timo*, oni pretervidis ion, ĉar oni ne atentis, ke la sekvonta bono ricevis sian forton por veni en ekziston ne el la timo, sed el la interkuŝanta momento de subita *venko super la timo*.

La supre preparolita *anksia timo* estas *pli malbona* ol nura simpla timo antaŭ io konkrete minacanta, ĉar ĝi ŝtopas ĉiun fendon, tra kiu povus ankoraŭ trovi aliron la *kuraĝo*, kiu estas nur „fororgesata“ de tiu

simpła timo, sed, en momento de rememoro, ofte estas subite alvokata kun nova forto.

Sed *anksia timo ne volas kuraĝon!* –

Homo subfalinta al ĝi rigardas la alvokon, ke li formetu de si sian senkuraĝecon, kiel malamikan enmiksiĝon en siajn laŭsupozajn rajtojn.

Tia timo estas kvazaŭ stato de memhipnotigo, el kiu oni povas baldaŭ vekiĝi nur tiam, se tiu vekiĝo estis energie „ordonita“ dum tempo libera de timo.

Homo facile alirebla por iaj formoj de timo apenaŭ povas sufiĉe ofte doni al si tiun ordonon.

Sed la spirita disĉiplo endanĝerigus ĉian sukceson de sia laboro je si mem, se li tolerus en si statojn de timo.

Ree kaj ree li devas instrui sin mem, ke fakte *ekzistas nenio*, kion li devus timi.

Krome, tiom longe, dum lia volo ne neas lian altan strebadon, staras ĉe lia flanko altaj helpantoj, kiuj per siaj propraj fortoj pliintensigas lian defendon ĝis plej alta grado.

Kiam la serĉanto *venkis* sian timon, li ĉiufoje denove ekkonos, ke lia tuta timo estis kaŭzita de fantomo estigita de li mem.

Per tia memestigita minaco, kiu disrompis iliajn fortojn, multaj homoj *mortigis* sin mem, sen voli tion!

Morto de nura *timo* estas multe malpli rara, ol oni ĝenerale supozas.

Timo ne estas io estanta *ekster* ni, sed ricevas sian tutan vivon nur per la homo mem.

Timo kompreneble ne estas io „spirita“, kaj same malmulte io „anima“, kvankam oni kreis la esprimon „anima timo“.

Tiu ĉi „anima timo“, kiel ankaŭ ĉiu alia timo *ekkon- ebla* kiel tia aŭ *maskita*, estas nenio alia ol speco de „spasmo“ de certaj plej fajnaj *nervoj*, kiu estas estigita per la retroefiko de certaj *imagoj* sur la cerbofunkcio: – do perturbo okazanta nur en la *fizika korpo* kaj la pure fizika *cerbokonscio*. –

Ke la *imagoj*, kies retroefiko kaŭzas tiun timo- spasmon, povas esti imagoj el la *spirita* aŭ la *anima* regiono same kiel el la regiono de la *fiziksensa* mondo, ne devas forlogi al tio, ke oni *projekcias* la fenomenon de timo en animajn aŭ eĉ en spiritajn regionojn!

La *batalado* kontraŭ la timo sukcesos nur tiam, se oni klare ekkonas la laŭkaze efikajn *imagojn*, kaj tiam dissolvas per sobra rigardado ties *timokaŭzantajn erojn*.

Ĉar tiuj imagoj estas diferencaj ne nur en la diversaj homoj inklinaĵoj al timo, sed ankaŭ povas multmaniere varii en unuopulo, estas konsilinde, doni al si ree kaj

ree la menciitan cerboordonon tuj „vekiĝi“ el okazinta timospasmo.

Sed *poste* oni nepre devas pense izoli la timokaŭzantan imagon kaj ekzameni ĝin pri ĝiaj timogenerantaj partoj.

Ekzakte konstatinte tiujn partojn, oni facile povas *dissolvi* ilin en pensado, tiel ke ili perdas sian timigan influon.

Mi ne volas diskuti tie ĉi aferojn, kiuj koncernas la *kuraciston*, sed nur doni al mia disĉiplo instrukcion pri tio, kiel li povas forigi la plej malbonan obstaklon por sia progresado sur sia interna vojo.

Tio estas tiom pli necesa, ĉar eĉ la homoj plej kuraĝaj en la ekstera vivo kelkfoje falas en la plej strangajn statojn de maskita timo, post kiam ili komencis labori serioze je la disvolviĝo de sia spirita organismo.

Tio fariĝas eksplikebla, kiam oni klarigas al si, ke multaj homoj ja kutimas iel trejni sian *fizikan korpon*, aliaj provas disvolvi sian *cerbon* al la plej alta efikeco, kaj ankoraŭ aliaj flegas sian *animan sentadon*, sed por la plej multaj homoj la propra *substancia-spirita organismo* – instinkte evitata de la terhoma animalo – restas en stato tute latentata, tiel ke ĝi estas plene nekonata regiono, iom „hororiga“ al la cerba konscio.

Sed io nekonata, ne esplorita ĉiam formas la *plej nedifinitan* kaj tial *plej volonte imagitan* scenejon de ĉiuj fantombildoj estigitaj de la timo en la homa fantazio.

Tiaj fantombildoj estas formitaj el la sedimentoj, restintaj en la cerbo, de frue aŭditaj *infanfabeloj*, iam kreditaj *asertoj de la tradicia religia sistemo*, kaj la imagoj pri laŭsupoza aŭ reala propra „kulpo“. Tiom longe, dum tiuj fantombildoj ne estas definitive forigitaj, rezoluta plupaŝado sur la interna vojo, kiu kondukas „en la spiriton“, estas apenaŭ ebla.

El tio rezultas al la serĉanto la devo, ĉiutage ekzameni la *realajn* motivojn de siaj pensado, parolado kaj agado, por iom post iom *ekkoni* la *timon* en ĉiuj ĝiaj maskoj, kaj elpeli ĝin el ĝiaj kaŝejoj.

Tio estas vere *progresiga* kontrolado de la interna vivo, kaj estas multe pli utila ol ĉiu „esplorado de la konscienco“, kiu serĉas ĉiun peceton de reala aŭ nur imagita „kulpo“, kaj rezulte povas fariĝi malbeno, al kiu ĝuste la *plej konsciencaj* naturoj povas plej facile fariĝi viktimoj...

La disĉiplo kaj liaj vojokunuloj

Vera spirita disĉipleco toleras malmulton tiom malbone, kiom la *ambicion!*

Dum en ĉiu alia homa farado la penado scii *pli*, povi *pli* ol aliuloj povas *progresigi* la penanton, la plej eta deziro de la *spirita* serĉanto: *superi* siajn vojokunulojn kaj kunstrebantojn, havas *malrapidigan* efikon.

Se li sentas eĉ *envion*, kiun li ne tuj *kontraŭbatalas* kaj daŭre *estingas*, *haltigas* ĉian spiritan kreskadon, kiom ajn multe la disĉiplo eble plue penadas ...

Nur kiam li *tute neniigis* en si eĉ la lastan senton de envio, li povas esperi veran plupaŝadon.

En tiuj ĉi aferoj ne ekzistas „esceptoj“: – nenia speciala pozicio por unuopaj homoj, – eĉ se ili staras en plej sublimes loko, aŭ en plej admirinda maniero akiris meriton pro servado al la tuta homaro. –

Kio efikas kun tia senindulgeco, tio estas la „*leĝo*“ de ĉiu spirite reala okazado, leĝo kiu estas imanenta en, kaj originas el, ĉiu substanco spirita vivo kaj ne povas esti pensata aparte de ĝi, leĝo kiu eterne ne bezonas timi malobeanton.

En la regiono de spirita okazado – ĝis ties plej ekstrema periferio – *ne povas okazi eĉ la plej eta afero*, kiu *ne* konformus al tiu „leĝo“, kiu estas la imanenta kaj integraparta *difiniteco* de la substanco eterna spirito.

Al la tie ĉi menciita propra „leĝo“ de la substanco eterna spirito gravas nur tio je la homo, kio estas de la *spirito*.

Ĉu tio, kio en li estas „de la spirito“, jam vekiĝis en lia *konscio*, ja estas grava por la unuopa *tera homo*, sed neniam por la *spirito*, kies apartenaĵo ĝi restas, eĉ se ĝi *ne* fariĝas perceptebla en homa konscio.

Oni ne devas lasi sin erarigi per la elegiaj revoj – eble permesitaj al poetoj, sed tre malproksimaj al la realo – pri dio, kiu spertas la *suferon* de l' homo kiel la *sian*, kaj atendas el de la homo *sian* propran *liberigon!*

La realo estas tre diferenca ...

La disĉiplo ĉiam tenu en sia memoro tion, kion mi provas diri pri nia *eterna estofundo*, kvankam ĝuste rilate *tiun ĉi* provadon oni ankoraŭ pli turmente sentas la nesufiĉecon de ĉiuj terhomaj vortoj ol en ĉiu alia provo de prezentado. Tamen tiu nesufiĉeco simple devas esti akceptata ...

Kvankam *tio*, kion mi ree kaj ree havas por trakti en miaj libroj, estas tiom supera al ĉiuj nocioj, oni ne

devas tute rifuzi ĉiun indikon aŭ aludon al la natura impulso de l' homo formi al si *imagojn* pri ĉiuj aferoj.

En vive solena respekto, mi parolas pri *plej alta Trio*, kiun mi nomas: *Praesto*, *Pralumo* kaj *Pravorto*, – pri ilia *memmanifestiĝo*, kiun mi provas komprenebligi en homaj vortoj en la Trio: *Pralumo*, *Pravorto*, *Pra-Spiritohomo*, – kaj mi montras, kiel tio, kion mi, estante plena de ekstremanta adorado, provas nomi „*Pra-Spiritohomo*“, estas „*Patro*“ – kaj samtempe „*Patrino*“: – de la *manifestiĝanta* trieco de la *spirita, anima*, kaj *intelekte komprenanta* homo ...

Mi provas montri, ke tiumaniere la reala „*homo*“ etendiĝas supren kaj enen en la plej internan *Diecon*, kiu amante faras sin spertebla al li, kiel lian *individue unuiĝintan „vivantan“ Dion* ...

Mi fine devas prezenti, ke oni sekve devas kompreni, ke tio, kion oni sur la tero nomas „*homo*“, estas ne *la eterna homo*, sed tiu animalo apartenanta al la tero, en kiu eternaj homaj emanaĵoj volas sperti sin mem, emanaĵoj, kiuj *pasis super* la kulminon de sia individua stato, kio nepre signifis, ke ili *devis fali*, – signifis falon „*pekan*“, ĉar *kaŭzitan per propra kulpo*, el plej alta lumado, – por kiu ne ekzistas alia kompenso ebliganta la reascendon, ol la enkarniĝo en unu el la *senkulpaj* fizikaj estaĵoj de la universo: en *animalo*; sed nur en speco de animalo, kiu estis *taŭga* por iam fariĝi *esprimilo* por eterna homo.

Ni konas tiun ĉi specon de animalo sufiĉe bone el propra fizika spertado! –

Kiom bone ni konas el memspertado nian animalan formon, la „homanimalon“, en ĝiaj bezonoj, inklinoj kaj instinktoj, tiom multe ni estas pretaj *aserti*, ke ĝi *ne* havas certajn aferojn, kiujn ĝi ja vere kaj *rajte posedas*, – nur tial, ĉar ni malfacile povas elteni, ke multe pli, ol kiom ni deziras, estas komuna al ni kaj la aliaj animaloj. Sed ĝuste tio, kion ni – kiel animaloj – *ne* povas atribui al ni, kontraste al niaj kunanimaloj: *la senkulpeco*, estus arde dezirinda al ni, se ni ankoraŭ *povus* partopreni en ĝi, nun ke kuŝas malantaŭ ni la unuaj jaroj de infaneco, kiujn ni pasis en pure animala senkulpeco. –

Tre volonte ni dezirus malligi nian cerbobazitan intelekton el la regiono de animaleco, kiel riĉiĝinta parvenuo volonte malligus sin el sia origina vivo-medio. Krome, ni inklinas aserti, ke niaj kunanimaloj *ne* posedas tion, kion ni laŭ kutima lingvouzo nomas nian „animon“ kaj kio nur *sekve de konscia disvolvigo* leviĝas en ni super la pli primitivan regionon, kiun ĝi formas en aliaj animaloj.

Por ne krei al si obstaklon sur sia vojo, la disĉiplo devas ekkoni, ke *preskaŭ ĉio*, kion ni ĝenerale nomas „animaj“ sentoj, ankoraŭ devas esti atribuita al la pasema *animala animo*, kiun ni kaj ĉiuj aliaj animoj

posedas komune, eĉ se ĝi en ni homoj – per la influo de la animo, kiun posedas nur la *homo* kaj kiu originas el *nepereontaj fortoj de la Dieco*, – akiras kapablon de pli riĉaj sentado kaj esprimado por la limigita daŭro de sia surtera vivo.

El la *animala* „animo“, kaj *nur* el ĝi, originas ĉia ambicio, ĉia avido de konkurencado kaj ĉia envio, kiuj povas fariĝi tiom treege fatalaj al la disĉiplo strebanta al la disvolviĝo de tio sia *spirita*. – –

Estas evidente, ke estas la devo de la disĉiplo laŭeble *subordigi* la pereontan *animalan* „animon“ al la *eternaj animofortoj*, kiujn li, kiel diogenerita anima „homo“, posedas.

Do ĉiuj animalanimaj sentoj, kiuj estas trovataj *konformaj* al la alstrebata unuigo de la eternaj animofortoj en la spertanta formo de la „*mi*“, devas esti *konservataj*, flegataj, kaj uzataj por faciligi la spertadon de unuigo en la *eterna* animo.

Sed ĉiuj sentoj de la animala animo, kiuj *kontraŭagas* la unuigon de la *eternaj animoelementoj* en la formo de identeco „*mi*“, aŭ la disvolviĝon de la substanco, eterna spirita organismo de l' homo, devas esti igataj iom post iom perdiĝi. Kvankam tiu ĉi procezo bezonas la tempon necesan por ĉia ŝanĝiĝo, tamen oni devas *dekomence kontraŭi* ĉion perturbantan.

La strebado al *superado* de kunstrebanato en la spirita instruiĝo, aŭ eĉ la *envio* pri la grado de disvolviĝo, kiun aliulo jam atingis, estas nur eksterigo de la *animala animo*, kaj ekzakte egala al la *batalo* inter animaloj pri la nutraĵo, kaj al la bone konata *envio* pri ĝi.

Sed la serĉanto devas ne nur esti *mastro* de tiaj malaltaj sentoj de la animala animo, sed ankaŭ vekti *malajn* sentojn en sia *eterna* animo.

Li ne devas ripozi, ĝis li sukcesas senti feliĉigan *ĝojon*, kiam li ekkonas, ke la spirita disvolviĝo de lia kundisĉiplo jam progresis multe pli foren ol la propra!

Devas fariĝi al li absolute nature, alporti al iu survoje restanta post li ĉian eblan *helpon!*

Ankaŭ tiuj homoj, kiuj estas nomitaj „majstroj“ de la arto de vivado en la tri mondoj (– la mondo de intelekta komprenado, la mondo de animoelementoj, kaj la mondo de la substanca eterna spirito –) neniam agas alimaniere.

Ili vidas kelkajn el siaj „fratoj“ en preskaŭ neatingeblaj *altoj*, kaj aliajn ankoraŭ en *malaltaĵoj*, kiujn ili mem jam antaŭ longe superpaŝis, aŭ neniam devis trairi.

Se estus eble al mi, aŭ al unu el miaj fratoj, malhavi la ardan *ĝojon* dum la suprenrigardo al la *plialtigita* frato, aŭ la brulantan volon helpi tiun, kiu paŝadas

ankoraŭ *tra siaj malaltaĵoj*, – ni estus ĉesintaj esti tio, kio ni estas, kaj nia lumado en la pralumo estus fariĝinta neebila. – –

Plia *animalanima* sento, kiun la disĉiplo devas dekomence lerni venki, estas la malica impulso malkovri la *mankojn* kaj *malperfektaĵojn* de la kunstrebanto, kaj eĉ montri ilin al aliuloj.

Ankaŭ *tiu ĉi* sento formas *fatalan* malhelpon por vera spirita disvolviĝo, kaj antaŭ ol ĝi ne estas *sen-spure forigita*, ĉia laŭsupoza „plupaŝado“ sur la vojo restas vanta memtrompiĝo ...

La disĉiplo, kiu atendas instruon kaj helpon el de la eterna, substanca spirito, ne devas eĉ *voli vidi* la *mankojn* kaj *malperfektaĵojn* de sia vojokunulo, kaj se ili *neeviteble* tamen fariĝas konataj al li, tiam li havas la *devon ignori* ilin!

Sed se temas pri aferoj, kiuj povus kaŭzi konsiderindan *damaĝon* al la kunulo mem kaj al aliuloj, tiel ke ili *ne devas* esti ignorataj, tiam la senintenca malkovrigo de tiuj mankoj konfidi ilin nur al *tiaj* homoj, pri kiuj ili kun plena certeco scias, ke ili penados nur protekti la koncernan kunulon *antaŭ li mem* kaj la aliajn *antaŭ li*.

Ankaŭ tiuĉirilate ekzistas paralelo al la lumantoj de la pralumo.

Ĉar ilia biologia naturo konsistas en la *difiniteco* de ilia ekzistovolo, difiniteco, kiun ili akiris jarmilojn antaŭ sia surtera naskiĝo, ili devas en la antaŭdifinita tempopunkto alpreni naskiĝon, kiu garantias la plenumadon de *ĉiuj psikofizikaj antaŭkondiĉoj* por la transdonita tasko, *eĉ se* ĝi ampleksas ankaŭ heredajn ecojn, kiujn la naskiĝinto povas nur provi bridi dum sia surtera ekzisto, ĉar li bezonas siajn fortojn por *aliaj celoj*, kaj ĉar samtempa *subigado* de tiuj ecoj, kvankam tre dezirinda, *malvastigus* la fizikan bazon de lia agado en nerespondecebla grado.

La evidentaj misinklinoj, entenataj en lia pasema fizika naturo, povas certgrade montriĝi en ĉiu kampo de terhoma agado kondiĉata de la fizikaj, animalaj fortoj, kvankam la lumanto de la pralumo ĉiam denove starigos barojn por malebligi tro drastajn formojn de eksterigo.

Neniu lumanto de la pralumo iam *havis* la infane malsaĝan, vantan ambicion voli esti rigardata kiel „sanktulo“, kaj neniu iam *povos* nutri tiun ambicion en si.

Sed ve al la lumanto, – *eĉ se* li staras sur home apenaŭ imagebla spirita alto, – kiu volus rigardi la eksterigojn de terhomaj mankoj je iu el siaj spiritaj „fratoj“ en *alia* maniero ol kun humurplena, tolerema *indulgo!* –

Ĉar alia memteno estas neebla en tiu ĉi spirita rondo, oni rigardu nur kiel komprenigan fikcion, se mi, pro la spirita graveco de tiuj ĉi aferoj, devas klarigi, ke eĉ la plej milda *inklino* de lumanto de la pralumo senti sin „*supera*“ al frato fariĝinta erarema en teraj aferoj, devus signifi la memneniigon de la propra spirita organismo...

La disĉiplo de la substanco, eterna spirito povas atendi veran sukceson de siaj penoj nur tiam, se li rigardas ĉion paseman, fiziktere kondiĉatan en ĉiu kunstrebanto, – ĉu al li persone proksima aŭ tute nekonata, – kun vera bonkoreco kaj komprenema indulgo, kaj tiam pli kaj pli komprenas, ke la individua *spirita organismo*, kiun lia *vojokunulo* volas atingi en si por sia konscio, estas *el la sama substanco* kiel lia propra.

Kiu estas ricevonta grandan heredaĵon en specifa tera valuto, tiu apenaŭ celas *malplivalorigi* ĝuste tiun ĉi valuton, nur pro tio, ke malmulte plaĉas al li la konduto de aliulo, kiu posedas, aŭ povas atendi, riĉaĵojn en la sama valuto.

Se tiu ekzemplo sufiĉe klare montras, ke malprudenta heredonto perdigus al si la posedaĵon destinitan por li, se li sukcesus damaĝi la valuton de sia heredaĵo, estos des pli facile kompreneble, ke tion, kion oni

mem alstrebas en si en spiritaj aferoj, oni ne povas *jesi por si mem*, sed samtempe *nei* en aliuloj. –

Temas tie ĉi pri posedaĵo, kiu estas tute ne *identita* kun la posedaĵo de aliulo, sed laŭ ĝia kvalito kaj ĝia origino en ĉiu rilato „*egala*“ al la posedaĵo de l' aliulo!

Kiu volas malebligi al aliulo la akiron de tiu pra-spirita havaĵo, tiu per tio forprenas ĝin de si mem.

Ĝis nun mi montris, kio devas esti evitata; sekvos nun priskribo de tio, kio estu farata.

La akiro de identita konscio en la *intelekta-nocia*, en la *anima*, kaj en la *substancaspirita* specoj de enprenado certe estas postulo de la substancaspirita mondo, sed tiu postulo neniel signifas, ke la enhavo de la intelekta-nocia konscio estu simple nur *ŝanĝata*, tiel ke ekde nun nur *nocioj pri substancaspiritaj aferoj* estu enprenataj.

Kontraŭe, temas pri tri specoj de konscio *klare apartigitaj unu de la aliaj* en sia respektiva naturo de spertado, kiuj fariĝu la posedaĵo de individuo en la spertado-formo „*mi*“, kiu estas propra eĉ al la plej-interno de tio Dia.

Tial io eksterordinare grava dependas de la volo de l' homo: – de lia preteco konatiĝi kun *tute novaj* formoj de konscio en si, kiuj havas malmulton komunan kun la *intelekta-nocia* konscio ĝis nun konata al li, kaj

ankaŭ ne povas esti priskribataj per vortoj, ĉar ili estas sperteblaj nur per propra „*perfariĝa ekkono*“.

Sed la serĉanto estus neniel progresigata, se li nun volus arbitre imagi al si diversajn bildojn, por veni al iu nocio pri la aparta, al li ankoraŭ ne konata naturo de la konsciiĝo en la eternaj fortoj de la *animo*, kaj en la substanco, eterna *spirito*.

Kion oni *flanke de la spirito* vere atendas de ĉiu disĉiplo, tio kuŝas *en la fizike palpebla* regiono, kvankam la efikoj etendiĝas fore transen de ĝi en regionojn pure animajn kaj substancspiritajn.

Nun estos la parolo pri la devo de ĉiu disĉiplo, ĉiam esti inda kaj daŭra kreanto de eksterigoj de sia spiriteco – kvankam ankoraŭ latentaj – en la vivo de la ekstera mondo, kaj vidalvide al la kunstrebantoj eble ligitaj al li.

En la momento, en kiu homo decidiĝas fariĝi disĉiplo de la spirito por atingi sian eternan *animan* konscion, kaj la konscion de la eterna *spirito* en la propra spirita organismo, li samtempe – kvankam tio ĉi estas memkompreneblaĵo, kiu ne bezonas solenan promeson – *konscie retiriĝis* el ĉiuj kunhomaj vivoeksterigoj, kiuj *malhelpas* la disvolviĝadon de lia spirita organismo, aŭ tute *malebligas* ĝin.

La ĉiutaga amuzovivo de nia tempo estas vera kolekto da tipaj ekzemploj de vivoeksterigoj de la

rafiniĝinta homanimalo, kiuj sabotas la atingadon de la konscio en la spirito, sed ankaŭ sur aliaj kampoj, prenendaj tre serioze, ne mankas vivoeksterigoj, kiuj estas apenaŭ sur la nivelo de la animala animo.

Kiu min kompreni *volas*, tiu komprenos min! –

Al ĉio ĉi la disĉiplo de l' spirito frontu *ne kiel batalanto*, sed nur per tio, ke li por si mem *ignoras* tiajn aferojn, – ke li penas, laŭ *siaj* povoj, meti ion *konformantan* al la eterna spirito en la lokon de tio *naŭze banala*, tio *animale volupta*, kaj tio *manie distordanta la vivon*, – kaj ke li ne laciĝas *montri* al aliuloj en sia propra konduto, ke ĉio ĉi *tute ne estas* dezirindaj kaj atentindaj aferoj de la vivo.

Sed mi ege petas, ke oni ne miskomprenu min!

Mi povas preni serioze *neniun* manieron rifuzi vivoeksterigojn spirite rifuzendajn, kiu ne plu povas *ridi* kaj *mokridi*!

Moroze stari malproksime, grumbli, kaj malkontente rezonadi estas *malbonaj* rimedoj por rimarkigi aliulojn pri tio, ke ili fariĝis sklavoj de malsaĝaj mem-sugestoj kaj troekscititaj nervoj. –

Pli efika ol ĉio alia estas la *ekzemplo*, kaj antaŭiri *donante ekzemplon* tial estas la plej grava tasko de homo, kiu *volas eniri „en la spiriton“*.

Unu sola ekzempla ago povas esti multe pli valora instruo al la *vojokunulo* ol plurhora disputado. Same,

la agado de disĉiplo en pli aŭ malpli vasta publiko estos des pli valora, ju pli firme li fidas la efikon de sia *ekzemplo*, kaj kiun li ĉiutempe *povas* fidi sekve de sia propra energia memedukado...

La disĉiplo devos plene konsciiĝi pri la fakto, ke li troviĝas profunde en la malklara nebulo de malsaĝa intelekta aroganteco tiom longe, dum li ankoraŭ opinias, ke venko en disputo kun siaj vojokunuloj havas la saman signifon kiel la venko super la propra interna mallumo. –

Ne per paroloj, sed nur per sia *ekzemplo* li povas montri, ke li vere fariĝis venkinto en si mem.

Interna vivo kaj ekstera mondo

Mi sufiĉe klare jam diris, ke serĉantoj povas esti „miaj“ disĉiploj nur kondiĉe ke ili tenas sin, rilate la *direkton* kaj propran *difinon* de sia strebado, je la sciigoj, instrukcioj kaj instruaj tekstoj entenataj en miaj libroj, kaj ke ili volas vidi en mia persono nenion alian ol la vokitan *peranton* kaj *formanton* de la prezentitaj enrigardoj kaj konsiloj.

Temas pri disĉipla rilato *pure spirita*, en kiu mi portas eternan respondecon pri ĉiu serĉanto, kiu agas laŭ miaj instruoj tiumaniere, ke li vere havas *rajton* nomi sin mia „disĉiplo“.

Tio ĉi ne estas egaligebla al la „konscio pri respondeco“ sentata kaj esprimata de ĉiuj konsciencaj animzorgantoj de la religiaj komunumoj antaŭ iliaj kredantoj, – sed mia respondeco por la serĉanto, kiu *ekzakte sekvas* la konsilojn donitajn de mi, por eniri „en la spiriton“, konsistas en nemalligebla *devoligo*, kiu ankaŭ en la venontaj *postteraj* statoj plue prezentas siajn postulojn, kaj ne estas *plenumita*, ĝis la serĉanto, kiu konfidis sin al miaj instruoj, *atingis* tion, kion mi promesis al li. –

Sed mi devas peti: ke oni *ekzakte distingu* inter tio, pri kio mi diras en miaj libroj, ke ĝi estas spirite *ebla*, kaj sub certaj, klare indikitaj kondiĉoj *spertebla*, prezentante ĝin nur por priskribi la diversajn ŝtupojn de spirita spertado, kiuj tute sendube ne povas fariĝi atingeblaj al ĉiuj homoj jam dum la surtera vivo, – kaj *tio*, pri kio mi klare kaj nemiskompreneble diras, ke ĉiu disĉiplo atingu ĝin dum sia surtera vivo.

Ke mi lasas la strebantojn preni vivan parton en la spertado de la *pli altaj*, eble surtere al li ankoraŭ neatingeblaj ŝtupoj de spirita spertokapablo, estas necese por ebligi al li doni al si mem „*direkton*“, sed certe ne signifas, ke mi povas *promesi* al li la atingon de tiu spertokapablo en la spirito.

Ĉio, kion mi montras kiel ion atingeblan, kondiĉas certan, pli aŭ malpli altan gradon de disvolviĝo de la spirita organismo, kaj en ĉiu loko de miaj libroj, kiu temas pri spertoj atingeblaj en la spirita vivo, mi ankoraŭ montras, kio devas jam esti atingita, se la sekvanta ŝtupo de spirita spertado estu ascendebla.

Post enprenema legado de miaj priskriboj la disĉiplo *mem* povas ekzakte ekkoni, kie li staras, sed li certe devas gardi sin, ke li ne iomete ŝanĝu favore al si mem la karakterizaĵojn de la koncerna spertokapablo, kiujn mi nemiskompreneble donas.

En *teraj* aferoj homo iufoje povas *trompe prezenti* gradojn de perfektigo tiel, ke aliuloj kredas, ke li jam posedas ilin, – sed en la *spirita* vivo ĉiu provo „trompe levi sin“ devas senkompate fiaski, ĉar tie ĉi homo preta fari tion povas trompi nur – *sin mem*.

La spirita ŝtupo, kiun li vere atingis, rezultas *sole* el lia akirita *spertokapablo* en la substancia eterna spirito.

Ke ne temas pri „ŝtupoj“ aŭ „gradoj“ rigide difinitaj unu fojon por ĉiam laŭ fiksita „rangordo“, tio estu ekster demando por la serĉanto.

Sed ĉar mi ree kaj ree aŭdas, ke oni treege volonte vidus la ŝtupojn de la alĉiela ŝtuparo „*numeritaj*“, kaj ĉar mi en tio malkovris miskomprenon, kiu estas nepre forigenda, la jeno estu dirata:

Nur *io spirita* povas „konscii“ ion spiritan!

Io spirita estas *spertata* nur en *unuiĝo*, kaj tio, kio volas unuigi sin al io spirita, devas *mem* esti io spirita.

Ĉio *nspirita* ne estas „reala“ al la spirito!

(– Mi parolas pri la *eterna*, substancia spirito, kiu *sola* estas vere nedetrubla, ne pri la rezultoj de la moviĝoj en forputremaj cerboj! –)

La tera homo neniam povus veni „en la spiriton“, se li estus nur tio, kio je li surtere manifestiĝas al la fizikaj sensoj.

Nur ĉar li samtempe estas *substanca, eterna spirito*, li povas *sperti* ion spiritan post kiam li *unuiĝis* kun ĝi, – li povas en si mem, estante spirito el la spirito de la eterneco, spirite konscii *sin mem*.

Por tio estas necese, ke certa konduto estu observata persiste dum longa tempo.

En miaj instruaj tekstoj la diversaj formoj de tiu konduto estas ekzakte priskribitaj.

La celo de tiu konduto estas antaŭ ĉio: – pli kaj pli ĉesigi la kutimon *pensi* la vivon anstataŭ vivi ĝin, kaj lerni *vivi* aktive kaj konscie. –

Aktiva *vivo* prenu la lokon de la „vivo en pensoj“.

Tiu strebado estos *plene* atinginta sian celon, kiam ankaŭ la pensado estas *vivata*, ne plu nur „pensata“. –

Kion tio *signifas*, mi ne povas diri pli klare, sed mi scias, ke neniu, kiu ankoraŭ kutimas *pensi* sian vivon, povas *imagi* eĉ nur svage, kion mi tie ĉi celas diri ...

Sed tio ne estas necesa, ĉar temas tie ĉi ne pri povo imagi, sed pri la lernado vivi!

Homo *pensanta* sian vivon kredas, ke li havas sian plenan *vivon* en la penso, ke li vivas, kaj en tio, *kion* li spertas, – sed al la pensado la vivo estas nur *objekto*, kvankam la objekto, kiu entenas *en si* ĉiujn aliajn eblajn objektojn de pensado, – kaj la vivo *estingiĝas* por la pensado en la sama momento, en kiu estingiĝas la pensado *mem*.

Sed la vivo ja *povas* esti pensata, kaj nenombritaj milionoj da homoj *konas* ĝin nur en pensado, – sed *neniam* la substanca eterna *spirito* estas kaptebla en pensado, sed *nur* en *vivado*: en la spertado *okazanta*, *ne* kondiĉata de pensoj! – –

Dum en pensado la vivo estas ĉiam nur *pensata*: – havas realecon nur kiel *penso*, – la vera *vivado* de la vivo formas *okazadon*, en kiu oni estas *enteksita*.

Tial „*lerni vivi*“ estas la tasko de tiu, kiu volas veni „en la spiriton“, ĉar oni venas en la spiriton ne en *pensado*, sed nur per sublima *okazado*, kiu estas spertebla nur al tiu, kiu tie, kie aliuloj vivas *pense*, kapabliĝis sperti en aktiva *vivado*.

Tiu ĉi *lernado vivi* ne estas atingebla „per unu fojo“, kaj la *povo vivi* ne venas al homo kiel „subita luminiĝo“.

Sed ĝi devas esti *labore akirata*!

Ĝi estas „*lernado*“, – kvankam ne lernado *per la intelekto*, – kaj kiel ĉiu lernado ĝi havas siajn diversajn ŝtupojn, aŭ, se oni volas resti ĉe la parabolo de l' vojo, siajn diversajn vojostaciojn. –

Por doni racian ideon pri tiu *intersekvado* al la serĉanto, kiu unue nur *pensas* kaj *komprenas*, sed ne *vivas* (mi tie ĉi ne parolas pri la pasiva „*esti vivata*“ de la korpo, procezo kiun oni *nomas* „*vivi*“), la „majstroj“ de la arto de *vivo* ĉiutempe parolis pri

intersekvaj „ŝtupoj“, aŭ pri vojostacioj atingendaj unu post la alia, sed neniam ili celis per tio *difini rigidajn ŝtupojn de instruplano*, kvazaŭ laŭ iu instrumentado.

Anstataŭ la bildo de vojo, aŭ de la ŝtupoj de ŝtuparo aŭ eskalo, oni povis elekti la bildon de kreskanta arbo, kiu eble povus montri *pli klare*, kiel dum la procezo de la *lernado vivi*, en la fluo de la jaroj, unu kreskopaŝo sekvas la alian, – kiel unu transiĝas en la alian. –

Mi ja povas *dividi* la kreskadon de arbo laŭ la plej diversaj sistemoj, kaj same la progresadon dum la *lernado vivi*, kaj tia dividado certe povas vekti la komprenon de la iom-post-ioma progreso en la kreskado de arbo, en la lernado vivi; sed estas ĉiutempe anstataŭigebla per *alia* divido.

La procezo de progresado neniel estas ŝanĝata, indiferente, ĉu mi dividas ĝin en sep, sepdek ok, aŭ dumil staciojn, ŝtupojn, gradojn! –

Oni do ne povas diri: „Tiu aŭ tiu ĉi staras sur ŝtupo numero ...“, sed nur: „li supozeble staras nur je la *komenco*, li faris *sufiĉe grandajn*, aŭ *tre grandajn* progresojn“.

(Tie ĉi oni kompreneble devas lasi ekster konsidero la „gradojn“ en la framasonaro aŭ similaj ordenoj, en kiuj la akirita „grado“ respondas kvazaŭ al akirita milita „rango“.)

Ĉio alia estas sensencaĵo!

„Sensencaĵo“, ĉar *sen senco* konforma al la realo!

Sed ŝajnas, ke tio ankoraŭ ne konvinke klariĝis al kelkaj el miaj disĉiploj, kaj tial mi nun priskribis ĝin tiom klare kiom eble.

Mi tie ĉi ne prezentas teoriojn, en kiuj „B“ rezultas el „A“, kaj „C“ el „B“, sed mi parolas laŭ propra *spertado!*

Ekde antaŭ multaj jaroj mi ne plu *pensas* mian vivon, sed ĝin *vivas*, – kaj ekde tiam mi same *vivas* mian *pensadon!*

Mi tute ne estis „privilegiita“ sur mia vojo, sed devis lerni la „*povon vivi*“ en senkompare *pli intensa* kaj *pli malfacila* maniero, ol kapablus iu el miaj disĉiploj!

Vere nenio estis plifaciligata al mi!

Krome, tiu „lernado“ *ne* havas *finon*, ĉar ĝi postulas ĉiaman *praktikadon*, tuj kiam ĝi estas „lernita“.

La morto de la tera korpo tuŝas tiun ĉi „praktikadon“ de „tio lernita“ nur tiurilate, ke poste *tiu korpo* ne plu estas *vivata*, – sed ja la *pensado* lernita de tiu korpo, kiun pensadon homo scias *vivi samtempe* en la *eterna* vivo nur tiam, se li tion „lernis“ tie ĉi en la tera korpo, per la korpo...

Kiu *ne* lernis „vivi“ ĝin *en la korpo*, tiu ankaŭ post la morto de l' korpo povas nur *sonĝe pensi* ĝin, same kiel li dum longa tempo – ĝis li lernas *vivi* tion spi-

ritan – sonĝe *pensas* sin mem, kvankam ankaŭ *tiu ĉi* pensado estas ne plu registrata en cerbo.

Mi ankaŭ ne vane parolas pri nia substanca-spirita *organismo*.

Por mi, „organismo“ estas io kreskinta el si mem kaj staranta en propra vivo.

La tera korpo estas por mi *ne* „organismo“, sed *kombinaĵo* el *organoj*.

Mi bone scias, ke oni povas pensi ankaŭ en *alia* terminaro, kaj kiam mi ankoraŭ *pensis* mian vivon, ĝi estis ankaŭ la mia, sed de kiam mi kapablas *vivi* mian pensadon, ĝi ne plu havas utilon por mi...

Sed ĉiu el miaj disĉiploj restas plene libera „traduki“ ĉion, kion mi diras al li per la vortoj eblaj al *mi*, en sian *propran* dirmanieron.

Mi opinias: – oni *ne* lasu la vorton „netuŝita“, sed oni lasu ĝin *ŝanĝiĝi* kaj *moviĝi!* –

Sed tie ĉi mi ankoraŭ devos diri al mia disĉiplo, kial mi bedaŭrinde havas multon por raporti ankaŭ *pri mi*: – kial mi ree kaj ree devas mencii min, kvankam nenio estas al mi pli malfacila, ol trovi min eĉ nur nomita en la tera vivo.

Ke mi do estas devigita agadi kontraŭ ĉiu emo kaj inklino, havas du kaŭzojn:

Unue, mi estas – je mia granda sufero – *devoligita* de la spirito, kvazaŭ „legitimi“ min antaŭ miaj

legantoj, indiferente ĉu tio plaĉas al mi aŭ ne, kaj senkonsidere al tio, kiel mi *sentas* la manieron de *akceptado* de miaj sciigoj fare de aliuloj.

Mallonge dirite, mi havas la spiritan devon montri al la legantoj de miaj libroj, en kiu maniero mi venis al la skribado de tio, kion mi skribis.

Due, mi kompreneble estas por mi mem la plej proksima, plej konata, kaj ĉiurilate *plej bone kontrol-ebla* kampo de spertado.

Ĉar mi scias, ke mi estas – ĝis la nepercepteble malgrandaj faldoj de miaj inklinoj – absolute libera de eĉ la plej eta kvanto de persona, kiom ajn „naiva“ mem-altigemo, sed ke mi kutimas objektive kaj sobre rigardi min mem pli ol ĉiun alian homon, tial mi mem plej bone povas respondi al mi kaj antaŭ mi, kiam temas pri aferoj, kies spertado estas bone konata al mi kaj kiujn mi komprenebligu al aliuloj.

Neniu, kiu eĉ nur relative bone konas min, povos iam *konsideri* la malsaĝan penson, ke mi faras min objekto de prezentado eble tial, ĉar gravas al mi *mia persono*, kiu vere nur servas al mi en plej strikta servo.

Se mi havus inklinon ĝui min mem en vanta mem-spegulado, mi vere scius prepari al mi tiun ĝuon en *dezirinda* maniero, ĉar mi ne estas asketo, kaj la stranga emo de asketo *ĝoji* pri tio, kio kaŭzas al li *doloron*, estas fremda al mi ...

Same kiel mi vere povas diri, ke mi ne celas *min mem* en mia agado, mi ankaŭ devas diri, ke la motivo de mia senripoza agado estas ne nur „la eterna savo“ de miaj disĉiploj, sed ankaŭ la ekigo de iliaj sekurigantaj fortoj necesaj por ĉia konstruado en la *ekstera mondo*.

Sed la disĉiplo devos akre distingi inter tio, kion *mi* kapablas fari pro li *spirite*, kaj tiu laboro je si mem, kiu povas esti farata nur *de li* ...

La vivo en la spirito *tute ne* estas *malamika* al la ĉiutaga vivo, kaj sekve la serĉanto de spirita sperto-kapablo devas *antaŭ ĉio* lerni plenumi la postulojn de la *ĉiutaga vivo*.

Oni ne lasu persvadi sin de la ekzaltitaj fantaziuloj de ĉiuj tempoj, ke la spirito de la eterneco estas atingebla nur tiam, se la serĉanto *turnas la dorson* al ĉiu *tereca* manifestiĝo de la realo.

La kontraŭo de tiu supozo estas vera!

Certe, la serĉanto neniam ligu sin al la tero per tiom mallongaj katenoj, ke li ne plu kapablas „*levi*“ sin, sed li ĉiam devas scii, ke ankaŭ tio tera estas ĉirkaŭita de eterneco.

En la tera ekstera mondo oni spertas nur la plurfoje transformitan, lastan *rezulton* de fortoj elirantaj el la eterna realo – post la kvazaŭ *reflekta interagado* de

tiuj fortoj –, sed tio ne signifas, ke al la tera homo estas donitaj nur ŝajno kaj ombro!

Por homo jam reganta siajn *spiritajn* sensojn, ĉiu surtera fenomeno povas esti retrosekvata ĝis la limo, kie ŝanĝiĝas la fizika perceptomaniero al la spirita, de kie la elementoj de la praesto, kiuj estigas ĉiun formon, tiam fariĝas sperteblaj kiel io substanca *spirita*.

Tio plej ekstera do estas kontinue *ligita* al tio plej interna, kvankam tio „*ekstera*“ estas, laŭ sia manifestiĝa formo, jam tro proksima al la eterna *rigideco*: la absoluta „nenio“, – ol ke ĝi iam povus *eniri* en *tion plej liberan*: tion „internan“, kiu restadas en eterna, nekaptebla *moviĝo*.

Sed ĉar la tera homo estas *io interna* erarvaginta en tion plej eksteran, li povas nur tiam esperi rekonscii sin mem kiel ion substance realan internan, se li eliras de la punkto, kie li troviĝas, do de *tio plej ekstera*: de sia propra, korpa „*ekstera mondo*“ kaj tiu ĉirkaŭanta la teran korpon. –

Lia *sentado* fariĝas *konscia* pri tiu ĉi ekstera mondo, kiom temas pri lia propra *korpo*, kaj ĉiu *ŝanĝiĝo de stato* estas perceptata per la *sentado*.

Sed tio, kio ekstere *ĉirkaŭas* la propran korpon, estas perceptata en la korpa *sentado* nur per tio, ke ĝi *impresas* la korpon, indifere, ĉu la influoj estas

apenaŭ percepteblaj aŭ ekstreme fortaj, – ĉu ili ekscitas la sentemon *agrabla* aŭ *turmente*.

Sed ĉi tio sense efikanta ekzistas por la sentado nur dum la koncerna *momento* kaj estas tuj anstataŭata de *nova* sentado, eĉ se tiu ĉi intersekvado de momentaj enhavoj kelkfoje ŝajnas esti konstanta *daŭrado* en la sentado, same kiel la sennombraj projekciaj bildoj de filmstrio estas perceptataj kiel *daŭra bildo*, tiom longe, dum ne okazas en tiu bildo iu moviĝo de aktoro aŭ alia moviĝema objekto.

Dum limigita tempo, – maksimume ĝis la morto de la tera korpo, – povas konserviĝi en la konscio *memoraj bildoj* de iama sentado de la propra korpa ekzisto, kaj de la emocia valoro de la sensaj impresoj ricevitaj el la ekstera mondo.

Ĉiu *plia* rilato al la ekstera mondo doniĝas al la tera homo *nur* per lia *imagokapablo*, sed la produktoj de la imagokapablo estas tiom submetitaj al la homa volo – en ties aspekto kiel *kredo* –, ke povis ekesti la filozofia eraro, ke „la imago“ estas *kreanto* de la fenomenaj formoj de la ekstera mondo.

Kvankam la imago certe *ne* estas tia kreanto, sed prezentas la rezulton de la kapablo kunigi sense nekapteblajn efikojn de la praesto-elementoj en la *formo de bildoj*: – kvazaŭ formi mallongigojn de komplika irado de okazoj en maniero adaptita al la

homaj sensoj, – tamen la mondo de imagado ankaŭ tute ne prezentas la realan mondon alireblan al la fizikaj sensoj.

Kiom ajn profunde ankrita eble ŝajnas al unuopulo lia mondo de imago, tamen kelkfoje aperos por li momentoj, en kiuj li ekkonas, ke li estas ankoraŭ *tre* malproksima de la punkto, kie li povus fari plenan uzon de la *eblo* enprenkapablo de siaj fizikaj sensoj. –

Sed la mondo de *imago* estas sendube la mondo *decida* por unuopulo, indiferente, kiom malmulte ĝi konformas al la mondo, kiu povus fariĝi kaptebla al li ĉe plena utiligado de la ebloj de liaj teraj sensoj.

Sed la mondo de memformitaj imagoj, tiom sekvoriĉe grava por la homa agado, estas tre variema formitaĵo, kiu estas influata ne nur de propraj ekkonoj kaj spertoj, sed samtempe ankaŭ de la mondoj de imago de aliuloj.

Tiel formiĝas homgrupoj el multaj unuopuloj, kiuj konsiderinde similigis siajn mondojn de imago, kaj el la *konstato* de tiu simileco la unuopuloj ricevas ŝajne „tute konvinkan“ argumenton pri la „ĝusteco“ de iliaj imagoj, kvankam tiuj ĉi eble estas nur karikaturaj de la mondo: de la mondo perceptebla al neinfluitaj fizikaj sensoj.

La spirita disĉiplo tial devos ree kaj ree kontroli ne nur sian *propran* imagobildon de la mondo, sed ankaŭ

tiun de la *grupo*, al kiu li aliĝis dum sia vivo, – aŭ de la *popola grupo*, en kiu li naskiĝis kaj kiu ampleksas *multajn* subgrupojn aŭ „partiojn“.

Ĉar la postuloj de la spirito restas la samaj, indiferente ĉu temas pri *unuopulo* aŭ pri „*amaso*“ da unuopuloj, oni kiel unuopulo ne *povas* sekvi la postulojn, kies plenumado estas antaŭkondiĉo por ĉiu volonta eniri „en la spiriton“, – kaj samtempe, sen klara rezervo, servi al la mondoimagobildo de grupo, kies eksterigoformoj aŭtomate *baras* la internan vojon en la spiriton.

Estas freneza mistaksado de la *universaleco* de la substanco, eterna spirito, se oni opinias, ke oni povas eniri „en la spiriton“, dum oni ankoraŭ *malestimas* aŭ eĉ persekutas per *malamo* ion, kio apartenas al la spirito!

Sed ĉar *ĉiuj teraj homoj* havas en si ion latentan spiritan, oni devas *tre* zorgeme distingi inter la strikta malaprobo de tiu aŭ tiu ĉi *opinio* aŭ *sinteno* ankrita en tio animalhoma, kaj la aroganta malestimado de aliopinioj, indiferente ĉu temas pri unuopuloj, grupoj, popoloj aŭ rasoj. – –

Ke la nutrado de malamaj sentoj faras homon „surda“ kaj „blinda“ rilate al la spirito, estos facile kompreneble.

Certe, la *kapablo* senti malamon ne estu *ekstermata*, ĉar per tio estus ekstermita ankaŭ la kapablo senti praspiritan, eternan *amon*, – sed la ekĝermanta sentado de malamo devas ne esti nutrata, sed nur „konstatata“, kaj tiam komenciĝas por la spirita disĉiplo la granda ago konsistanta en tio, ke li transformu la malamon, ĵus perceptitan en ĝia tuta impeto, en *amon*, kies kontraŭpoluso ĝi estas, kiel eksteriga formo de *unu sama forto* ...

Kie do oni *nutras* malamon kontraŭ unuopuloj, partioj aŭ tutaj popoloj, tie ne ekzistas eblo de disvolviĝo por la disĉiplo de l' spirito, kaj li prave forcedu la lokon, oferitan al li aŭ jam de li akceptitan, al aliulo, kiu *ne volas* leviĝi super sia pli aŭ malpli alte disvolviĝinta animala naturo. –

Al kiaj ajn influoj de la ekstera mondo serĉanto eble staras vidalvide, li devas ĉiam resti konscia pri tio, ke nenio en tiu ĉi ekstera mondo povas bari al li la vojon en la spiriton, tiom longe, dum li sekvas en sia vivo ekzakte la konsilojn, kiujn mi abunde prezentis al li en miaj instruoj.

Gravas tiu „*sekvado en la vivo*“, ne la *aprobado* kaj la *entuziasma parolado* pri ili!

La vivado laŭ miaj instruoj kondiĉas, ke la disĉiplo *antaŭ ĉio alia* metu ordon en sian personan *ĉiutagan vivon*. –

Nur kiam *tie* ĉio estas „*en ordo*“, – en *ĉiuj* partoj kaj en *ĉiu* rilato, la serĉanto akiris la rajton strebi pluen, kaj nur tiam estas *rajtigita* lia atendo, ke li vere *atingos* dum sia surtera vivo tion, kio estas surtere *atingebla* al li en la spirito.

La multe populara kaj ŝatata „vastanimeco“, laŭ kiu oni opinias, ke estas permesate trakti la ĉiutagajn aferojn kiel bagatelojn, estas tre malbona!

Eĉ se iu afero per si mem *vere* estas „bagatelo“, *neniam* estas bagatelo, ĉu ĝi estis traktata *laŭspirite* aŭ ne. –

En parabolo de la evangelioj, sinjoro diris al sia servisto: „Ĉar vi estis *fidela* pri malmultaj aferoj, mi starigos vin super *multaj*.“

Kio tie estas esprimita parabole, koncernas unu el la plej gravaj postuloj de la spirito.

Kiu ne fariĝas kapabla konduti en sia pasema *surtera* vivo jam tiumaniere, ke lia pensado, parolado kaj agado povas esti *agnoskata* de la *spirito*, tiu ankoraŭ ne komprenis, por kio la ekstera mondo povas servi al li, kaj lia tuta strebado al praspirita konsciiĝo ne povas utili al li.

Sed kiu tie ĉi en sia ĉiutaga mondo faras *eĉ la plej malgrandan* decidon agi, – eĉ se oni postulas ĝin de li en ekstreme urĝa maniero, – kun la plej granda *natureco* en *tia* maniero, kvazaŭ lia eterna savo *dependus nur* de tiu ĉi *sola* decido, tiu homo estas multe pli

proksima al la spirita konsciiĝo ol li suspektas, kaj eĉ se liaj hereditaj dispozicioj malhelpas plenan disvolv-
iĝon tie ĉi en lia surtera vivo, li tamen eniros en la eternon *kiel konscia homo!*—

Dum la paso de la homara historio, en ĉiu parto de la mondo kaj sur ĉiu ŝtupo de kulturo, nur malmulto estis tiom *miskomprenata* kiel la antaŭsentado, pli aŭ malpli vigla en ĉiu tera homo, de la substanco, eterna spirito en la propra homa memo!

Delogite de banalaj konkludoj, serĉantoj de la spirito opiniis kaj ankoraŭ hodiaŭ opinias, ke la ĉiutaga, fiziksense spertebbla ekzisto devas al la spirito esti kvazaŭ abomeninda.

Surbaze de tiu opinio oni pensas esti rajtigita konkludi, ke devas esti neeble atingi la spiriton, se oni ne malestimas la teran ĉiutagan vivon kaj ne rigardas ĝin kiel grandan malfeliĉon kaj mizeron.

Ĝis la hodiaŭa tago oni povas facile nombri la malmultajn, kiuj sukcesis superi tiun malhelpantan tradicion kaj tiam lernis ekkoni, ke la vojo en la *eternan, substancan spiriton* komenciĝas meze de la tempa, ŝajne tiom sensignifa *ĉiutaga vivo...*

Sed povas esti *disĉiplo de spirita instruado* neniu, kiu ne scias trabati sin al tiu primara ekkono!

Kiel miaj libroj estu uzataj

Baldaŭ post la komenciĝo de l' nova jarcento, antaŭ pli ol tridek jaroj, kiam mi faris la unuajn provojn meti *en lingvan formon* la vive spertitajn spiritajn ekkonojn, kiujn mi ĝis tiam estis ricevinta, – sed ankaŭ jardekon pli malfrue, kiam mia spirita ekkonado kaj miaj provoj *prezenti* tion spertitan estis fariĝintaj al mi kutimaj okazado kaj agado, – mi eĉ ne en sonĝo ekhavis la ideon publikigi, jam *dum mia surtera vivo*, ion el tio, kion mi estis skribinta en sekreta skribo por preventi ĉian profanadon.

Sed mi estis decidinta, ke mi en la ĝusta tempo transdonos la „ŝlosilon“ de mia sekreta skribo al persono ŝajnanta fidinda al mi, kies tasko estos eldoni *post mia morto* la postlasitaĵon en konvena maniero.

Inter miaj paperoj ankaŭ troviĝis dum kelkaj jaroj en fermita koverto ĉi-rilata „lastvola dispono“ kaj dua ekzemplero de la skribŝlosilo por la okazo de subita morto *antaŭ* la instalado de „testamenta plenumanto“.

Mi ne suspektis, ke iun tagon mi *mem* alirebligos tiun antaŭtempan „postlasitaĵon“ al la publiko, kaj transskribos por la *kompostisto* tion skribitan en skribo komprenebla nur al mi mem. – –

Mia plej grava spirita gvidanto kaj instruanto, kiu kompreneble sola estis fariĝinta „*aŭtoritato*“ por mi, iam unuafoje konvinke klarigis al mi, ke ne sufiĉas la nura *postlaso* de instruaj tekstoj, sed ke pezas sur mi la devo respondi pri miaj skriboj antaŭ la tuta mondo *persone, dum mia ekstera surtera vivo*. Tio metis min en longtempan staton de nedirebla premateco, ĉar tago post tago mi vane serĉis eblon akordigi tiun necesan memmalkovradon kun mia laŭspirita bezono de kaŝiteco kaj izoliteco.

Mi kapablis eligi min el tiuj internaj plagoj nur post kiam la sama, respektoplene amata, patreca spirita gvidanto *denove* renkontis min, – ĉifoje malproksime de mia hejmo, – kaj mi tiam, dum unujara spirita kaj arta laboro en Grekujo, estis konatigita kun aliaj viroj, kies spirita frato mi estu ekde tiam.

De Ateno mi tiam sendis, prove al limigita publiko, la unuan malgrandan manuskripton, sub la titolo „La lumo de Himavat“, unue signita nur per la tri inicialoj de la spirita nomo transdonita al mi de miaj instruanto kaj fratoj.

Tio okazis en la jaro 1913.

La malgranda instrulibro estis akceptata multe pli bone ol mi antaŭe supozis povi atendi.

La tiam aparte publikigita teksto hodiaŭ estas re-integrata en la „Libro de la Reĝa Arto“, el kies materialo mi unue elprenis ĝin.

Kiam poste preskaŭ neniuj jaroj pasis, en kiu ne aperis unu el la libroj verkitaj de mi, kvankam pleje de ne tre granda amplekso, – aŭ eĉ pluraj *samtempe*, – kelkaj legantoj sin demandis, ĉu ili admiru tiun riĉan produktadon, aŭ envicigu la aŭtoron inter la „skribistoj de grandaj kvantoj“.

Oni ne povis scii, kiom el tio, kio jen aperis en tiom rapida vico, antaŭe kuŝis multajn jarojn, en formo preskaŭ prespreta, *en mia skribtablo*, aŭ estis skribita *en Grekujo*, longe antaŭ ĝia apero.

Al tio apartenas: preskaŭ ĉio en la „*Libro pri la vivanta Dio*“ kaj en la „*Libro pri la homo*“, – preskaŭ ĉio en „*Pli da lumo*“ kaj en la „*Libro de la Reĝa Arto*“, same kiel partoj de la „*Libro de interparoloj*“, – tute aparte de multo, kiu jam estis skribita, sed devis esti ŝanĝata de mi, ĉar en sia unua formo ĝi estis destinita por publikigo *post mia morto*.

Ĉar mi estis ricevinta la devigan taskon paroli jam *dum mia ekstera surtera vivo* pri ĉiuj aferoj prezentitaj en miaj libroj, tio tute ne povis esti farata en la antaŭe elektita formo de spirita *postlasaĵo*.

Mi mencias ĉiujn ĉi aferojn tie ĉi, ĉar mi kelkfoje renkontas tro „literature“ orientitan opinion pri mia

instrua agado, kiu malproksimigas sin tro fore de la donitaj faktoj.

Mi neniam havis eĉ la plej malgrandan literaturan ambicion!

Doni lingvan formon al la aferoj pri kiuj mi skribas – malgraŭ ilia rezisto kontraŭ ĉia prezentado – , estis por mi ĉiutempe plej malmola, treege respondeca *devigo*, de kiu mi tre volonte estus liberiginta min, se tio estintus ebla.

Mi ne skribas por ĝui la skribadon!

Nenio el tio, kion mi ĝis tiu ĉi horo donis en skriba formo, estis skribata „facile“. Tio estus tute neebla, ĉar la preskaŭ neportebla eterna respondeco, kiu ne povas esti deprenata disde mi, devigas min ekzameni ne nur ĉiun *frazon*, sed ĉiun *vorton* kaj ĉiun *silabon* por eltrovi, ĉu ili estas taŭgaj portantoj de la enhavo konfidita al ili, – ne en la *literatura* senco, sed rilate al ilia kapablo porti ion *substance spiritan*!

Ĉie, kie fariĝas necese, la frazoj, vortoj kaj silaboj estas kvazaŭ „*ŝargitaj*“ per io substance spirita.

Mi povas nek priskribi nek instrui la por tio necesan procezon, kiu estas „magia“ en la *plej alta* senco, sed nur atentigi pri tio, ke temas pri nenio mistera, sed pri la uzado de la substancspiritaĵoj vibroj latente ekzistantaj en preskaŭ ĉiuj lingvoelementoj kaj liberiĝantaj dum voĉa aŭ nur „pensata“ elparolo.

Multaj homoj konscie *sentis* ilin, sen suspekti, ke la helpo perceptata de ili estis „akumulita“ en la vortoj prezentitaj al ili ...

El tiu ĉi prezento de eksterordinaraj faktoj, – kiun mi povas surpaperigi nur post eldevigita superado de komprenebla timideco antaŭ la imputoj de nekomprenemuloj, – sufiĉe klare rezultas, kiel oni *ne* uzu miajn librojn.

Oni ne legu ilin kiel ion pli aŭ malpli interesan, fantastan, strangan, aŭ fide akceptitan, en la maniero, en kiu oni hodiaŭ ĝenerale kutimas „legi“: do legante en *grupoj de frazoj* – apenaŭ plu en frazoj – kaj ĉiam estante *ie aliloke* ol ĉe la senco de *vorto*, kiun oni ĵus „preterflugis“. –

Oni ne legu ilin opiniante, ke ili estu komprenataj laŭ la stereotipa interpretado, per kiu oni *laŭkutime* traktas ĉion legitan. –

Pro la supre menciitaj devoj rilate al *tio substanca-spirita*, mi tre ofte devas uzi tion alie kutiman en *nekutima* maniero, ĉar ritmoj, ripetiĝo de vokaloj aŭ konsonantoj, kaj similaj aferoj, dependas *ne* nur de *stilaj* postuloj, – tute aparte de tio, ke mi devas doni al mi la rajton aranĝi la vortojn kaj formi la frazojn tiu-maniere, ke ili esprimas al *mi mem* tion, kion mi volas peri al aliaj homoj.

Estas neeble al mi juĝi aliamaniere, ĉu mi plenumas mian devon, aŭ ne!

Por povi vere *akcepti* tion, kio estas *donita* en miaj libroj, oni devos lerni legi *tre atente kaj trankvile*. –

Sed *tia legado valoros la penon!*

Dum la *unua* legado oni direktu sian atenton nur al la ĝenerala „enhavo“, tia, kia ĝi prezentiĝas ankaŭ al hastema leganto, kiu neniam „havas tempon“.

La libro, kiun la disĉiplo tenas en la mano, jam devas esti *kontentiginta* lian scivolemon pri tio, kion ĝi enhavas, se li tiam komencas legi ĝin en *alia* maniero, kiu povas estigi helan, feliĉigan *eksonadon* en lia eterna animo kaj en lia propra *substancaspirita* organismo ...

Tiom longe, dum tekstero en unu el miaj libroj, kiu temas pri la vera eterna spirito kaj pri la aferoj de la substancaspirita vivo, ankoraŭ ne vekas la *ĝojigan resonon*, kiun oni sentas, kiam io longe forgesita, al kiu iam apartenis nia *amo*, estas menciita antaŭ ni, – tiom longe la koncerna tekstero ankoraŭ ne estas komprenita!

Sed estas tute ne utile, nun *cerbumi* pri tiu tekstero, aŭ voli *arbitre estigi* en si senton, kiu ankoraŭ ne eksonas per si mem de interne.

En tiu maniero nur plej malbonaj memtrompoj povas esti nutrataj.

Se la sento de *rekono*, kiu tuj donas plenan *certecon* kaj estas akceptata kun profunda *ĝojo*, *ankoraŭ ne venis*, oni lasu ĉiun tian teksteron portempe netuŝita, kaj turnu sin al aliaj tekstopartoj, kiuj tiumomente havas ion por diri.

La disĉiplo devos *multfoje* enmanigi la saman libron, se ĝi donu al li tion, kion ĝi havas por doni al li! –

Sed estus tute malĝuste, se oni obstine volus *ree kaj ree* legi libron tiom longe, ĝis ĝi prezentis ĉion, kion ĝi havas por doni.

Tiumaniere la serĉanto ne nur atingus nenion, sed farus sian internon tiom apatia kaj indiferenta, ke li plejbonaokaze nur post kelkaj jaroj fariĝus kapabla legi iun el la libroj kun malferma menso kaj kun utilo.

Oni kredu al mi, ke ne okazis pro arbitro, se mi dispartigis tion, kion mi devis instrui aŭ prezenti, en la diversajn malgrandajn volumetojn, en si kompletajn.

Kaj se mi nomas ĉiun el tiuj volumetoj „libro“, tio tute akordiĝas kun ĝia *enhavo*, kiun mi estus povinta esprimi multe pli facile en *ampleksaj* prezentoj, ol en la formo kunpremita je la plej limigita spaco, en la intereso de la disĉiplo.

Kiu ekzamenas la aferon pli atente, rimarkos, ke ne estus malfacile, prezenti la enhavon de tia malmulte ampleksa „libro“ pli detale en sufiĉe granda volumo. Sed tia ekzamenado ankaŭ malkaŝos, ke mi ne nur havis bonajn motivojn por anstataŭe prezenti al la hodiaŭa homo – kiu „ne havas tempon“ por legi – ĉion en „libroj“, kies amplekson mi konstante provis *limigi*, sed ke la dispartigo farita de mi estas rajtigita per *psikologiaj* konsideroj.

Se iu volas instrui siajn kunhomojn pri personaj, eble neaŭtoritataj opinioj pri supersensecaj aferoj, tio certe povas esti farata *en unu sola* libro, kiu povas ŝveli al la amplekso de leksikona volumo, sen perdi aŭ gajni per tio je valoro.

Sed se mi volas gvidi homojn, kiuj provas trovi la vojon al sia substancia *spiriteco*, gvidi ilin tiumaniere, ke ili fariĝas *trovintoj*, tiam mi devas konsideri la *eblojn de komprenado* en la homoj, donitajn laŭ la naturo de la cerbomoviĝoj, kaj multon alian, – tiel ke mi alportas helpon *nur tiam*, se mi montras la alstreb-atan altan celon ree kaj ree de *alia* flanko.

Tial mi devas konsili al mia spirita disĉiplo, ke li ekprenu *alian* el miaj libroj tuj kiam li rimarkas, ke al

la ĵus legitaj instruaj vortoj kaj priskriboj ne respon-
das interna resonado.

Kaj li faru tian interŝanĝon *tiom ofte*, ĝis li alvenis
al tiu libro, kiu havas por doni al li valorojn, kiuj en la
koncerna momento vekas internan *resonon*.

Ni kapablas tute ne ĉiutempe enpreni *la samon!*

En malsamaj tempoj necesas ne nur malsamaj
esprimformoj, sed ankaŭ alia „perspektivo“, el kiu ni
povas rigardi la objekton de nia scivolo, se ĝi donu al
ni la postulatan respondon.

Sed ĉar in miaj unuopaj libroj nova kaj nova
esprimado de tio spirita estas serĉata kaj trovata, kaj
ĉar mi ankaŭ *instruas* rigardi el ĉiuj konsidereblaj
vidpunktoj tion, kio apartenas al la spirito, la serĉanto
neniam venos en la embarason, *kiun* el miaj libroj li
elektu en la koncerna momento.

Sed oni agos prudente, se oni ne intermiksas tion,
kio estas donita en miaj unuopaj libroj.

Ĉio ja necese unuiĝas kun ĉio, kion mi kapablas
iam prezenti, sed mi dekomence ne opiniis absolute
necesa paroli en ĉiuj libroj strikte laŭ la sama maniero
uzi la vortojn, ĉar tia esprimlimigo estus deviginta
min lasi nedirita tromulton, kiun mi nepre volis diri, –
sciante, kiom la serĉantoj bezonis ĝin.

Mi ne intencis prezenti „sistemon“ de „mond-
rigardo“, sed provis priskribi la laŭokaze prezentitan

spertadon nur kiel *ion izole rigarditan*; tial facile povus estiĝi nevolitaj eraroj, se la parolmaniero de unu libro estus *miksita* kun tiu de alia.

Tamen, al pli profunda rigardo certe baldaŭ montriĝos, ke ĉiuj eldiroj vere interharmonias, indifere, ĉu tiu aŭ tiu ĉi eble metas *propran* akcenton sur io aparta en tiu aŭ alia rilato.

Ree kaj ree temos pri la demando, ĉu oni rigardas miajn librojn nur kiel „legaĵon“, aŭ vidas en ili taŭgajn helpojn, jam elprovitajn de multaj homoj, por veni sur la vojon al la spirito, kaj fine „en la spiriton“.—

Tiuj ĉi libroj celas servi kiel *instrukcioj* por trovi la vojon „en la spiriton“.

La motivo por mia skribado estis dekomence tre malproksima de la deziro aŭ espero ricevi kiel verkisto la atenton de aliaj verkistoj.

Estis al mi multe tro grava la *celo* de mia skribado, celo difinita de mi mem, ol ke tiu skribado povus ŝajni al mi atentinda *per si mem*.

Sed mi certe ne povas fari miraklojn, kaj se mi povus tion, mi certe ne farus ilin, ĉar mi ne povus akordigi la nuran deziron, „ke miraklo okazu“, kun la strukturo de la substanco eterna spirito, malfermita al mia spertado.

Malgraŭ ĉio, kion mi enmetis en miajn librojn, tial ne sufiĉas enmanigi ilin nur de tempo al tempo, foliumi en ili, kaj dum kelka tempo pripensadi iun teksteron.

Se oni volas uzi tiujn librojn *ĝuste*, tiel ke ili *kapablas* doni tion, kion ili havas por doni, tiam ili devas fariĝi *konstantaj akompanantoj* de la spirita disĉiplo en lia vivo.

Devas pasi neniu tago, en kiu li ne aŭskultas ilin!

Tio estas necesa precipe tial, ĉar la serĉanto troviĝas en *tempo*, kaj en *mondo* estiĝinta el ĝi, kies tendencoj estas ankoraŭ direktitaj al la penetrado kaj laŭeble plena regado de *tio plej ekstera*, dum li mem penu observi kaj sekvi sian propran direkton al *tio plej interna*.

La nuna *tempo* ne estas pli bona nek pli malbona ol iu alia!

La nuna *mondo* estas ĉiurilate la esprimo de tio, kion la nuna homo devas esti *travivinta*, se la direkto, konservita dum multaj jarcentoj, de sia strebado al tio ekstera kaj plej ekstera *povu inversiĝi* kaj turni sin al tio interna.

Sed oni ne imagu al si tian returnon kiel specon de „amasa konvertiĝo“!

Tio, kio vere fariĝis *kapabla ŝanĝiĝi*, estos ŝanĝata *tute nerimarkate*, – kaj jam hodiaŭ ni troviĝas *meze*

de la transformiĝo, dum la plej multaj opinias, ke la tendenco iradas ankoraŭ plu eksteren ...

La okuloj estas ankoraŭ tro forte al kutimiĝintaj al la serĉado de horizontoj supozataj, aŭ nur esperataj, en la *fora ekstero*, ol ke ili povus jam hodiaŭ klare ekoni, kiom trostreĉita jam fariĝis la tuta strebado al tio ekstera kaj tio plej ekstera, ĉar ĝi estas plu nur periferia, ĉesonta vibrado de tuthomaraj impulsoj, kies forto jam estis *retirata* en ĝian fonton.

Kiel apenaŭ brulanta kandelo unufoje ekflagras superhele antaŭ ol estingiĝi, tiel hodiaŭ la urĝo strebi en la eksteron ceremonias triumfojn, kiuj estas nur konfirmoj de tio, ke ili *devas estingiĝi*, ĉar la inversiĝo de la direkto nerimarkite jam *komenciĝis* ĉie, kie la koncernaj kondiĉoj jam estas plenumitaj.

La grandaj tuthomaraj impulsoj *kurbigas* la strebfortojn, sed ne *rompas* ilin!

En tia tempo la pensado, parolado kaj farado de l' individuo estas multe pli signifaj ol *meze* de la ankoraŭ *ne* finiĝonta efikado de tempaj tuthomaraj impulsoj.

Sed tiu, kiu serĉas sian propran spiritan centron, bezonas en tia tempo pli ol ĉiu aliulo internan mondon de sperto, en kiu tio laŭekstere *estonta* jam *energias* en laŭrealeca formo ...

Helpi al la serĉanto malfermi tiun ĉi spirite difinitan mondon de sperto en lia interno, estas unu el la plej gravaj taskoj de miaj libroj.

Sed ili povas plenumi tiun taskon nur tiam, se la serĉanto *konsultas* ilin *tagon post tago*, ĉiam restante konscia pri la miloble provita fakto, ke li *neniam* povas *elĉerpi* ilin.

Mi povas trankvile aserti, ke homo, se li kapablu vivi multajn jarcentojn en sia surtera korpo kaj estus ĉiutage en interna komuneco kun miaj libroj, tamen ne ĝisvivus la tagon, en kiu li povus aserti, ke tiuj libroj ne havas ion novan por diri al li.

En tempoj de *inversiĝo* de la direkto de l' tuthomara strebado, multaj aferoj opinias sin tre progresemaĵoj kaj formantaj la estontecon, kiuj vere estas nur fina sekvo de la dubinda volo al *persistado* en *tio estinta*.

Tial la serĉanto estas ĉiam en danĝero de granda trompiĝo, se ne estas alireblaj al li ekkonoj, kiuj klare montras al li tion *vere* formantan la estontecon.

Sed tiajn ekkonojn li renkontos sur preskaŭ ĉiu paĝo de miaj libroj.

Se li ĉiutage legas kaj sekvas iliajn konsilojn, la estonteco malkaŝos sin al li jam *en lia propra estanteco*, kaj li estos *kunkreanto* de *tio venonta* per sia *propra sperto* antaŭe ricevita.

Tiam li spertos je si mem, ke eĉ en la *plej premaj* kaj *malĝojigaj* tempoj la surtera ekzisto ne povas perdi sian „sencon“, – sed ke tiu senco kuŝas ne en *pensado* kaj en *io pensita*, sed en la kapablo *agadi* laŭspirite.

Kiu volas esti mia spirita „disĉiplo“, tiu estas tio ne jam tial, ĉar li *pensas* tiel, kiel li trovas min pensanta aŭ *pensas* trovi min pensanta, – sed fariĝas tia disĉiplo nur tiam, se *lia aktiva vivo* transformiĝas laŭ la konsiloj de miaj libroj.

Se li iam povas diri al si, ke tiuj ĉi libroj donis al li motivon komenci novan vivon plenan de interna *certeco* kaj antaŭe nekonata *ĝojo de aktiveco*, kaj ke li ne plu volas vivi sen la instruoj kaj proponoj, kiujn mi skribis por li, – tiam li uzis miajn librojn „*kiel ili estu uzataj*“!

Same kiel aliaj aferoj de tiu ĉi mondo, ankaŭ libroj fariĝas beno aŭ malbeno ne sole per sia *imanenta valoro*, sed eĉ pli per la maniero, en kiu oni *uzas* ilin.

Do ankaŭ la ekigo de la substancaspirita *helpo*, kiun miaj libroj kapablas alporti, dependas altmezure de la maniero, en kiu la leganto *uzas* ilin.

Ekzistas surtere nenio, kion oni ne povus *misuzi*, – kion oni ne povus forfremdigi de ĝia *bena* uzado! –

Ĉirilate miaj libroj certe ne prezentas escepton.

Sed kiu hodiaŭ ankoraŭ ne scias uzi ilin en ĝusta maniero, tiu prefere formetu ilin portempe, ĝis li *scias* uzi ilin tiel, kiel ili tion devas postuli.

Li *ne vane* atendos sian pli bonan komprenon, kondiĉe ke la *volo* veni al lumo kaj klareco restas viva!

Trovos la internan pacon per la uzado de miaj libroj nur *tiuj* homoj, kiuj antaŭ sia propra konscienco estas vere „*de bona volo*“ ...

Fino